



中國報

EL POPOLA

CINIO





Tibetanoj festantaj sur stepo Foto de LIU XIAOJUN





INTER NI

Nia leganto B. Simaitis en Sovetio proponis en sia letero novan rubrikon pri ĉinaj sporto, muziko kaj masaĝo; alia leganto petis de ni la rubrikon "Kion donis al mi Esperanto". Kaj iuj aliaj legantoj skribis al ni, ke Ĉinio havas longan historion, kaj esperas ke ni pli multe konigos imperiestrojn, sciencistojn, militistojn, verkistojn kaj aliajn elstarajn personojn en la antikva Ĉinio.

Ni kore dankas ilin pro iliaj prizorgo al EPC kaj tre utilaj proponoj. Ni laŭeble kontentigos la deziron de tiuj legantoj.

Radio Pekino dissendas ĉiusemajne kanton en Esperanto, tio multe plaĉas al nia pola leganto B. Andrzej. Li konsilis al ni lanĉi novan rubrikon por aperigi tiujn kantojn. Ni pardonpetas, ke ni ne povas publikigi en ĉiu numero pro teknika malfacilo.

Por festi la 40-an Datrevenon de la Paca Liberiĝo de Tibeto en majo de 1991, nia revuo aperigis en sia 5-a numero intervjuon, novelon kaj fotojn temantajn pri la vivo de tibetanoj. Ni kredas, ke ili helpas al niaj legantoj koni en diversaj flankoj la hodiaŭan Tibeton.

La Red.

ENHAVO

- 6 **La ekonomia situacio de Ĉinio**
- 10 Tibeto fascinanta
- 14 VOJAGO EN TIBETO (IV):
Intervjuo al urbetestro Labaciren
- 16 Lasta tendo sur la herbejo (Novelo)
- 34 Hunan, loko konata, sed multe ŝanĝiĝinta
- 44 Kontraŭ akva polucio
- 37 ANTIKVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:
Kuraĝiga filozofio
- 42 **Por sano de la kamparanoj**
- 26 POR VIA SANO:
Gimnastiko kontraŭ gastroptozo (II)
- 27 ARTOJ DE ĈINIO:
Kamparana pentrarto
- 31 Danco kaj opero surstrate de Pekino
- 49 LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:
Domoj de Dingcun—“palaco” de nordaj kamparanoj
- 22 EL ĈINAJ GAZETOJ
- 30 AMUZOJ
- 40 KURANTAJ AFEROJ
- 20 HOMOJ NEFORGESEBLAJ (2): Braun

18 Vojo de mia verkado

39 POR KOMENCANTOJ

23 ESP-NOVAĴOJ

4 INTER NI

SUR LA KOVRILO:

Leono (kamparana pentraĵo)

de HU FENGLIAN

2 Tibetanoj festantaj sur stepo

Foto de LIU XIAOJUN

4 Zigzaga vojeto en parko

Foto de ZHANG ZHENGUANG

21 MIRINDAĴOJ DE ĈINIO:

Vinbero Chang

de WU XINHUA

24 Popolaj dancoj de Ĉinio

de HAN HONG

46 Budhismaj seminarioj en Pekino

de WU XINHUA

54 Koloraj skulptaĵoj en antikva templo

Fotoj de YAN JIN


SUR LA DORSKOVRILO:


[ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Tibeto

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Zhaoyuan-gubernio (p. 42)
2. Taicang-gubernio (p. 42)
3. Jinshan-gubernio (p. 42)
4. Xiangtan (p. 34)
5. Huaihua (p. 34)
6. Xiangfen-gubernio (p. 49)
7. Gyaze-gubernio (p. 14)







"Cirkulatoro de Ĉinio n-ro 1", la plej granda instalaĵo de Ĉinio por studi pri regata fuzio, atingis la internacian nivelon.

LA EKONOMIA SIT

Sur Daqing-petrolkampo de Ĉinio, unu el la grandaj petrolkampoĵ en la mondo



Parto de la speciala ekonomia distrikto Zhuhai





Sablovento-rezista forsto de Ĉinio





La Jilin-a Kemi-industria Kompanio, unu el la grandaj petrolaj kaj kemi-industriaj entreprenoj de Ĉinio

UACIO DE ĈINIO

de LIU XIAOFEIA

La 115 000-tonela oleŝipo, konstruita de la Dalian-a Ŝipfarejo, estas avangarda en la mondo.



KUN forpaso de 1990 finiĝis la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990) de la disvolviĝo de la socio kaj nacia ekonomio de Ĉinio. En la pasintaj kvin jaroj, dank' al sia penado, la Ĉina popolo grandpaŝe antaŭeniris sur la vojo de reformado kaj pordmalfermado, rapide disvolvis sian nacian ekonomion, fundamente plenumis la taskojn de la Sepa Kvinjara Plano kaj kreis kondiĉojn por la sekvanta kvinjara plano.

En la Sepa Kvinjara Plano la kompare rapida disvolviĝo de la nacia ekonomio de Ĉinio speguliĝis ĉefe en la jara meznombra kresko de la totala naciekonomia produktovaloru (7.6%), kiu estis pli alta ol la difinita de la plano (7.5%). La agrikultura produktovaloru kreskis meznombre je 4.2% ĉiujare. Kvantam en tiu periodo la nombro de la ĉina loĝantaro pliiĝis je 61 470 000, tamen la pokapa meznombra kvanto de la ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj pliiĝis rimarkinde. Laŭ la informo publikigita de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio, en la Sepa Kvinjara Plano, la jara meznombra produktovaloru kreskis je 12.8%, multe pli alta ol tiu de la mondo (4.1%). Dank' al tio, ke Ĉinio alte taksis la ŝanĝiĝon de la totala investo de la fiksita kapitalo kaj ĝia strukturo, pliiĝis la konstruon de la fundamentaj industriaj objektoj, kiaj energio kaj trafiko, kaj havigis al si novajn produktopovojn, nun la produktokvantoj de petrolo, ŝtalo, fero, elektro kaj kemifibroj okupas la kvaran lokon de la mondo, dum tiuj de karbo, cemento, katuno kaj televidiloj la unuan lokon.

En tiu periodo Ĉinio konstruis novajn fervojojn de 3 448 kilometroj, kaj ŝoseon de 80 000 kilometroj kun pli bona kvalito. La ekfunkcio de la moderna aŭtovojo inter Shenyang kaj Dalian plenigis blankon tiuflanke. En tiu periodo rapide disvolviĝis ankaŭ la telekomunika afero de Ĉinio. La materialoj liveritaj de la Ĉina Ministerio de Poŝt-Telekomuniko montris, ke en la pasintaj 5 jaroj la ŝtata investo de la fiksita kapitalo superis la totalajn sumojn en la antaŭaj 36 jaroj. En la pasintaj 5 jaroj la telefonoj duobliĝis en la tuta lando, tial en 300 urboj de Ĉinio oni povas telefoni rekte al aliaj landoj de la mondo.

En la Sepa Kvinjara Plano pliboniĝis la vivo de la urbanoj kaj kamparanoj. En 1990 la pokapa jara meznombra enspezo de la urbaj loĝantoj estis 1 360 juanoj, t.e. duobla de tiu en 1985, dum la pokapa neta enspezo de la kamparanoj estis 640 juanoj,

kreskis meznombre je ĉ. 10% ĉiujare, kiu estis pli alta je 3% ol tiu difinita de la plano. Se oni dekalkulas la prezaltiĝon, do la efektiva kresko estis malpli rapida. Tiam rimarkinde kreskis la deponitaj monsumoj en la urboj kaj kamparo. En la fino de 1990 la totalaj deponitaj monsumoj de la tuta lando atingis 700 miliardojn da juanoj, t.e. kvarobla de tiu en 1985. Laŭ takso, la totalaj deponitaj monsumoj plus la mono tenata de la loĝantoj estas pli ol 1 000 miliardoj da juanoj.

En la pasintaj 5 jaroj Ĉinio aktive praktikis la pordmalferman politikon kaj akcelis la reformon de la eksterakomerca sistemo, dank' al tio rapide disvolviĝis la ekonomia kontakto kun aliaj landoj. Ĉe la marbordo formiĝis vasta ekonomia zono malfermita. Post fondiĝo de la 5 specialaj ekonomiaj regionoj kaj la 14 marbordaj urboj malfermitaj, Ĉinio fondis




La du-traka elektrizita fervojo inter Datong kaj Qinhuangdao en konstruado. Ĝi iongas 653 km.

la marbordajn ekonomiajn regionojn malfermitajn al eksterlando en la deltoj de Yangzi-rivero, Perlo-rivero kaj suda Fujian-provinco. Pudong-distrikto de Ŝanhajo ĉe sia apero tuj interesis la ekonomiajn rondojn de la mondo.

Bona tendenco aperis ankaŭ en la ekstera komerco, kiu kreskis kontinue kaj stabile. Jam antaŭ du jaroj oni efektivigis la difinitan celon, ke en 1990 Ĉinio eksportos varojn de 38 miliardoj da usonaj dolaroj. En 1990, la totala sumo de la importaĵoj kaj eksportaĵoj estis 108 miliardoj da usonaj dolaroj, kiu estis 155.2% de tiu en 1985. La eksporto kaj importado en la ekstera komerco disvolviĝis ekvilibre. Pli ra-

ĉiĝis la konsisto de la eksportaĵoj kies 70% estis industriaj produktaĵoj. En la marbordaj kaj landinternaj regionoj rapide disvolviĝis la eksportado de la prilaboritaj produktaĵoj, kompensa komerco, ĉelanda komerco, varinterŝanĝa komerco kaj aliaj. Pro brido de importado de la elektraĵoj kaj luksaj konsumajoj, malpliĝis la impo en 1990, dume daŭre kreskis la eksporto, tiel ke plene ŝanĝiĝis la eksterkomerca deficitado. En tiu periodo plu disvolviĝis sciencoj, teknikoj, edukado, kulturo kaj higieno. Tiutempe en la scienc-teknika kampo aperis 20 000 gravaj scienc-teknikaj fruktoj, iuj el ili jam atingis la internaciajn nivelojn. Novan atingon en la kampo de sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio markis serio da gravaj sukcesoj, kiaj la finkonstruo kaj ekfunkcio de la elektrona-pozitona koliziilo, pezjona akcelilo kaj sinkrona radiada laboratorio kaj la sukcesa lanĉo



Riĉa rikolto de greno

de la grandpova ligita raketo "Changzheng n-ro 2", la telekomunika satelito "Azio n-ro 1" kaj meteorologia satelito "Fengyun n-ro 1".

En 1990 Ĉinio sukcese okazigis la 11-an Azian Sportkunvenon en Pekino kaj akiris plej multe da medaloj.

Ĝenerale dirite, en la Sepa Kvinjara Plano Ĉinio akiris grandajn sukcesojn en la nacia ekonomio, tamen aperis ankaŭ iuj problemoj pro tio, ke iuj politikoj estis ne perfektigitaj, tro disaj estis la investoj, tro ampleksaj la ekonomiaj aferoj, ekz. en la antaŭaj 3 jaroj de la Sepa Kvinjara Plano, la nacia

ekonomio disvolviĝis tro rapide, kaj eĉ ne regeble; tro rapide kreskis ankaŭ la prilabora industrio, dume stagnis la fundamenta industrio, kio kaŭzis evidentan malekvilibron de la konsisto de la produktaĵoj; la tro grandaj kredito kaj investo kaŭzis rimarkindan inflacion; la tro rapida kresko de la loĝantoj formis novan premon al la ekonomia strukturo. En la lastaj 2 jaroj de la Sepa Kvinjara Plano Ĉinio praktikis la politikon reordigi la ekonomian medion, reguligi ĝian ordon, plenumplekse profundigi ĝian reformon kaj akiris bonan efikon, kio mildigis iujn kontraŭdirojn.

De 1991, Ĉinio eniris en la periodon de la Oka Kvinjara Plano. Ĉiuj gvidaj ekonomiaj departementoj jam faris aranĝon pri sia laboro en la venontaj jaroj. Surbaze de la serioza resumado de la spertoj de la ekonomia laboro dum la Sepa Kvinjara Plano, prenante la sintenon serĉi veron el la faktoj, laŭ la konkretaj naciaj statoj de Ĉinio ili difinis la taskojn kaj celon de la nacia ekonomio, t.e. paŝon post paŝo fondi sciencan sistemon pri makroskopaj reguligo kaj rego de la nacia ekonomio, kiel eble plej rapide starigi la socian garantian sistemon por la senlaboruloj, bone teni la ekvilibron inter la livero kaj bezono en la tuto, serioze teni la fundamentan ekvilibron inter financo, kredito, materialoj kaj alilandaj valutoj, malpliigi la jaran prezaltiĝon je malpli ol 10%; kaj pere de la reformo kaj ekonomiaj metodoj kateni la disiĝon de la financaj kaj materiaj fortoj, paŝon post paŝo efektiviĝi sanan merkatan sistemon, kaj starigi normalan ekonomian ordon, preni la raciigon de la industria strukturo kiel gravan enhavon de la ekonomia disvolviĝo por daŭrigi la konvenan disvolviĝon de la ekonomio, daŭre zorgi la laboron pri la naskolimigo.

La registaro postulas, ke en 1991 ĉiuj regionoj kaj departementoj dediĉu sian ĉefan atenton al reguligo de la industria strukturo, plenergie disvolvu la aktivadon pri la "jaro de bonkvalito, specomultiĝo kaj profito", ĉiuj entreprenoj, precipe la industriaj, rimarkinde levu la profiton de siaj ĉefaj produktaĵoj, plue prosperigu la merkaton por akceli la sanan ekonomian cirkuladon kaj starigu la ekonomian sistemon kombini la planizitan ekonomion kun la merkata reguligo.

1991 estas grava jaro en Ĉinio por plibonigo kaj reguligo de la ekonomia konstruado kaj profundigo de la ekonomia reformado. Ĝi estas ankaŭ la unua jaro de la Oka Kvinjara Plano. Malgraŭ multaj malfaciloj, oni kredas, ke Ĉinion atendas brila perspektivo en la ekonomio, Ĉinio stabile disvolvos la produktadon kaj akiros pli grandajn sukcesojn. ■

* La aŭtoro estas oficisto de la Ĉina Planiza Komisiono.

LI QIANG:

Tibeto fasci



LIBERIGO DE TIBETO

nanta

Kampanaroj atendas aŭton por viziti urbon.
Foto de HAN RUIFENG



Virino sur paŝtejo
Foto de YUAN XUEJU



Gaja danco Foto de BAN RUIFENG

Paŝtistoj en festivalo Foto de HAN RUIFENG



LA 40-A DATREVENO DE LA PACA

LA 23-an de majo 1951 Tibeto estis pace liberigita. Komen-
ciĝis la nova etapo, ĉu kiu la tibeta popolo mem mastras
sian sorton. En la pasintaj 40 jaroj Tibeto evoluis en
senprecedenca rapideco kaj radikale pliboniĝis la vivo de
ĝia popolo.

Antaŭe la ĉefa negoca metodo en Tibeto estis "varo kontraŭ
varo", sed nun nemalmultaj tibetanoj okupiĝas pri komercado. La
tibetanoj jam scias marĉandi.

Se vi promenos sur stratoj de tibetaj urboj, vi trovos, ke plejparto
de la urbanoj vestas sin moderne. Junulinoj portas pli belajn vestojn.
Ili sekvas la modon kaj snobajn kolorojn. Komprenoble en la homa-
masoj vi trovos virinojn en tradiciaj tibetaj kostumoj kun arĝentaj
diademoj kaj kolĉenoj kaj fortajn virojn portantajn kapornamojn el
ruĝa lano. En festo pli multaj tibetanoj portas naciajn kostumojn.

Se vi gastos ĉe tibetanoj, vi trovos iliajn ĉambrojn mode meblitaj.
En multaj familioj estas televidiloj kaj magnetofonoj. Kaj vi trovos
ankaŭ, ke la plej bonan lokon en la ĉambro okupas budhoniĉo, antaŭ
kiu eterne lumas buterlampo.


Tibeto abundas je temploj kaj parto de ili estas malfermita al
turistoj. Oni povas vidi grandan kvanton da valoregaj antikvaĵoj kaj
piajn budhistojn, kiuj respektive prezentas al la budhostatuo kukojn
kaj buteron, genuiĝas kaj longe frapas la frunton kontraŭ la teron.

La tibetanoj havas tre multajn festojn, preskaŭ en ĉiu monato ili
festas feston. En festotagoj ili bele vestas sin, kantas kaj dancas
por esprimi amon al la vivo.


La ĉefurbo Lhasa de Tibeto, same kiel la ĉefurboj de aliaj prov-
incoj, havas modernajn establaĵojn. Ankaŭ en aliaj tibetaj urboj
Xigaze, Nagqu kaj Gyaze estas asfaltitaj vojoj, luksaj personaŭtoj
kaj domoj de bela arkitekturo.

En la pasintaj 40 jaroj Tibeto progresis, la popola vivo pliboniĝis.
Tradicio kunekzistas kun la reformado. Tio estas la fascina forto de
Tibeto. ■

Gastigado Foto de **HAN RUIFENG**



LIBERIĜO DE TIBETO




Geamantoj Foto de **CHE FU**

Sur strato de Lhasa Foto de **HUANG MUCHAO**



Kapto de bela sceno Foto de **DI XIANGHUA**

Budho-adoranto Foto de **CHE FU**



VOJAĜO EN TIBETO (IV)

Intervjuo al Urbetestro Labaciren

de LI QIANG

ANTAŬ 40 jaroj super Tibeto regis feŭdservutula reĝimo. Tiam pli ol 90% de la tibetanoj estis servutuloj. Sen agro kaj persona libereco, ili, ekspluatataj de nobeloj kaj senjoroj, penegis laboris de generacio al generacio en senjora bieno, baraktante kontraŭ mizero, malsato kaj morto.

Post la Paca Liberiĝo de Tibeto en 1951, la socia pozicio de la servutuloj ŝanĝiĝis iom post iom. Dank' al la praktiko de la demokratia reformado kaj abolo de la malnova agrara sistemo en Tibeto en 1959, realiĝis la deziro de la servutuloj pri agro kaj brutoj kaj ili komencis la novan vivon.

Kiel vivas hodiaŭ la antaŭaj servutuloj?

En Gyaze-gubernio la tibeta kadro Awang akompanis min al la hejmo de Labaciren.

Mi iris al bonordaj kortetoj kun tibet-stilaj domoj. Awang frapis je iu pordo. La mastro bonvenigis nin al la korteto, salutinte min kaj Awang. En la dekstra flanko de la korteto estas stalo, kie du bovidoj manĝas furagon. Fronte de la korteto staras domo el 4-5 ĉambroj. En la maldekstra flanko sidas 2-ĉambra domo, kiu eble servas kiel kuirejo kaj tenejo de ĉiutagaj bezonaĵoj. Ĉe la loĝdomo juna knabino estis teksanta lanan tapiŝon, kiu estas fama nacia metiartaĵo farata en Gyaze.

La mastro kondukis nin en grandan ĉambron en la orienta flanko. Mi sidis sur seĝo, dum

Awang kaj la mastro sidis sur la terlito krucinte sub si la krurojn. Sur la terlito ĉe la muro kaj fenestroj estas multe da litaĵoj kaj lanaj tapiŝoj.

En Gyaze mi vizitis la gubernian fabrikan de lana tapiŝo. Ĉiu tapiŝo kostas pli ol mil juanojn. Li havas tiel multe da lanaj tapiŝoj, kio montras, ke li estas riĉa. Tie estas ankaŭ aliaj tapiŝoj, kiuj kuŝas ne sur la terlito, sed sur seĝoj kaj pendas sur la muroj, elmontrante siajn belajn desegnojn. Eble per tio li volas paradi per sia teksarto de lanaj tapiŝoj.

La mastrino elprenis delikatajn porcelanajn tasojn kaj proponis al mi tason da buter-teo. Mi stariĝis, levis la tason kaj trinkis iomete. Ŝi tuj plenigis la tason kaj petis min refoje trinki. Kiam mi trinkis iom, ŝi refoje plenigis, tion ni ripetis plurfoje. Kaj la mastrino ne forlasis min. Mi ja ne povis plu trinki. Awang diris al mi kun rideto: "Eltrinku la tason per unu tiro." Mi eltrinkis ĝis la fundo kaj la mastrino kontente ridis kaj petis min siĝi.

Awang konigis al mi, ke tio estas tibeta moro. Estas ne dece proponi duontason da teo al gastoj kaj oni devas ĉiufoje plenigi la tason. Kiam vi eltrinkis la tason ĝis la fundo, tio montras, ke vi dankas la mastron kaj ne volas plu.

Nur post tio, Awang oficiale konatigis min kaj la mastron, kiu nomiĝas Labaciren. Informite, ke mi venis el Pekino kaj volas gastigi ĉe li, li deiris de sur la terlito kaj

ne lerte diris al mi en han-lingvo, forte premante mian manon: "Bonvenon! Bonvenon!"

Ĉar Labaciren parolis tibetan lingvon, kiun mi ne komprenis, Awang do servis al ni kiel interpretisto.

Post kiam mi klarigis al li mian celon de la vizito, Labaciren konigis al mi sian familian pasintecon.

Liaj antaŭuloj estis servutuloj dum pluraj generacioj. Lia avo estis vendita al nobelo Bengen. 10-jara, lia patro eklaboris por Bengen - sekvante lian avon. 17-jara, lia patro komencis malproksimen veturi kun azeno por fari transportadon por la nobelo. Pene laborinte tutan jaron, li gajnis nur unu pantalonon kaj laborinte 2 jarojn, unu tibet-stilan robon. Krom tio, la mastro donis al li nenion.

Antaŭ sia edziniĝo, la patrino de Labaciren laboris en la hejmo de alia nobelo. Post la geedziĝo ankaŭ ŝi venis en la hejmon de Bengen. Kvankam ŝi naskis 11 infanojn, tamen 5 el ili mortis de morbito. Pro tio, ke lia patrino estis nesana, lia patro devigite luis dezertan kampon de alia nobelo por kulturi. Ĉiujare li pagis duonon de la rikoltitaj grenoj al la nobelo kiel terrenton kaj donis 185 kg. da sekalo al Bengen por substitui ĝin al la laboro, kiun lia edzino devis fari. Li malfacile vivtenis la familion, farante transportadon tage kaj terkulturante vespere.

Tiam ili havis nenion alian, krom eluzita litkovrilo kaj 3 mal-

LIBERIĜO DE TIBETO



Labaciren (maldekstre) kaj liaj familianoj

Foto de LI QIANG

grandaj tabloj. Ili loĝis en kaduka domaĉo luita ĉe Bengen. Por la domlupago, ili devis multe fari pliajn laborojn en la ĉefsezono de kamplaboro.

Labaciren invitis nin al alia ĉambro. Li elprenis el amaso da objektoj unu kvadratan tableton kaj 2 longajn tablojn similajn al benko. Jen ĉiuj havaĵoj de lia familio en la pasinteco. Labaciren diris al mi, ke jam longe oni ne uzis ilin, sed li daŭre konservas ilin por konigi al siaj posteuloj, kiel mizera estis la vivo de la servutuloj kaj oni devas alte taksi la hodiaŭan feliĉon.

Kompare kun siaj gepatroj, Labaciren, oni povas diri, vivas hodiaŭ kiel en paradizo.

Poste, Labaciren rakontis al mi sian pasintecon.

La 12-an de novembro 1959, kiam la 13-jara Labaciren paŝtis ŝafojn por nobelo, lia patro venis kaj konigis al li, ke komenciĝis la demokratia reformado. De tiam li ekvizitis lernejon. Jen li komencis la novan vivon. Tiu tago estas neforgesebla por li.

Poste Labaciren fariĝis ŝtatoficisto. En 1971 li fariĝis estro de la subdistrikto. Tiam en la subdistrikto vivis 213 familioj el 813 homoj, kiuj kulturis 104 hektarojn da agroj. Kaj la totala jara grenproduktokvanto estis malpli ol 140 000 kg. kaj la pokapa meznombra produktokosto estis nur 71 juanoj. Kaj ĉiujare la ŝtato donis al lia subdistrikto 50 000 kg. da greno. Tiam la subdistrikto havis nur 500 juanojn da kolektiva fonduso, 3 komunajn domojn kaj 3 klasĉambrojn en la elementa lernejo. Fariĝinte estro de la subdistrikto, Labaciren gvidis la loĝantojn en la produkto, precipe en la forstumado de la dezerto. Ili plivastigis la arbaron de unu al 50 hektaroj. Dank' al la plibonigo de la natura medio, la agrikultura produkto disvolviĝis jaron post jaro.

De post 1981, la ŝtato alvokis, ke oni funkciigu plurflankajn entreprenadojn, disvolvante la agrikulturon. Pruntepreninte 10 000 juanojn de la ŝtato, ili aĉetis dizelenergian generatoron kaj muelmaŝinon. Tiamaniere ili ekentreprenis flankokupadon. Antaŭ la fino de

1982, ili ne nur sin kvitigis al la ŝtato, sed ankaŭ starigis butikon per sia neta profito, 5 000 juanoj.

En la fino de 1987, kiam Labaciren forlasis la subdistrikton kaj eklaboris kiel urbetestro, la subdistrikto jam havis du 1 046-kvadratmetrajn forcejojn, 2 olepremaŝinojn, 3 muelmaŝinojn, 2 traktorojn, 3 magazenojn kaj 8 laktobovinojn, kiuj ofertas ĉiutage al la loĝantoj freŝan lakton. Kaj krome en la subdistrikto funkcias elementa lernejo kun 8 klasĉambroj, kie lernas 215 geknaboj.

Dum lia oficado, oni komplete plibonigis la loĝkondiĉojn de la tieaj loĝantoj. En 1987, la tieaj loĝdomoj estis subite detruitaj de akvo elŝprucinta el la tero. Pro tio, la loĝantoj devigite starigis tendojn sur altaĵoj por loĝi. Informiĝinte pri tio, la registaro donacis 400 000 juanojn al la suferantoj kaj elektis lokon por ke ili konstruu novajn domojn. Ankaŭ la subdistrikta registaro donis monhelpon al la malriĉaj familioj. Dank' al tio, 162 familioj multe suferantaj de la katastrofo transloĝiĝis en novajn loĝejojn, kaj aliaj dangeŝaj loĝejoj estis riparitaj. La loĝejo de Labaciren kaj liaj najbaraj tibet-stilaj loĝdomoj estis konstruitaj tiutempe.

Nuntempe en la familio de Labaciren estas 13 membroj. Liaj du pliagaj filoj, edziĝintaj, laboras en la gubernia kudrejo kaj hotelo respektive. La familio de Labaciren kulturis laŭ kontrakto unu hektaron da agroj, kaj ĉiujare rikoltas 7 500 kg. da grenoj. Restiginte sufiĉan kvanton por la mangado, li vendas 3 000 kg. da grenoj al la ŝtato. Same kiel multaj aliaj loĝantoj de la distrikto, ankaŭ la familio de Labaciren havas ĉevalon, ĉaron kaj laktobovinojn. Lia tuta familio vivas feliĉe.

Hodiaŭ, Labaciren, kiel urbetestro, gvidas la 1 293 familiojn kun pli ol 5 000 loĝantoj sur vojo al la nova, pli feliĉa vivo. ■

Lasta tendo sur la herbejo (novelo)

de CAIDAN*

POST intensa konstruado en somero kaj aŭtuno, aperis sur la herbejo Tawu nova paŝtista vilaĝo el vicoj da novaj tegolitaj domoj.

Kiam venis vintro, la paŝtistoj ĝojplene transloĝiĝis el nigraj tendoj el bovharoj en vastajn helajn tegolitajn domojn, kaj per tio ili finis sian migran vivon.

Tamen sur la herbejo solece staris ankoraŭ unu ĉifona tendo. En la malplena tendo estis nur felaj litaĵoj malpuraj kaj plenaj de grasmakuloj, tera forno, bovlo kun desegno de drako, malnova kupra tekruĉo, kaj ilia mastro — 84-jara maljunulo.

Li estis Ciren Danba. Okdek kvar jaroj plenaj de malfacilo kaj penado tute elĉerpis lian energion kaj nun li ŝajnis spiranta marioneto. Li tuttage sidadis senmove ĉe la forno hejtata per bovfekaĵo.

Estis vintro, sed la suno afable varmigadis. Nek venteto nek frosteto.

Ciren Danba senĉese insultis la vintron sen frosteto.

La luko estis ombrata. Ciren Danba levis la kapon kaj vidis tra la luko, ke ŝafo-granda aglo kaŭras sur elektrofosto. La aglo alnajlis la akran, avidan rigardon al la nelonge vivonta Ciren Danba. Ciren Danba unufoje sentis malkontenton kontraŭ aglo, kiun li ĉiam rigardis kun respekto. Elektrofosto, aglo, ĉu ili devis esti unu apud alia? Ve, ĉia krimo estis farita de homoj malobeantaj la prapatrojn.

Ĉiu krimo okazis pro starigo de la elektrofostoj...

En printempo la gvidantoj de la paŝtista komitato energie propagandis al la paŝtistoj unu post alia, ke ili devas havi fiksan loĝejon kaj fini la migran vivon, starigi stalojn kaj konstrui furaĝkultivejojn por brutoj. Ili klopodis por konvinki, ke tio estas nova vivmaniero de paŝtistoj...

Ciren Danba ploris. Li dronis en granda malĝojo. Li opiniis tion katastrofo.

En la okdek kvar jaroj Ciren Danba tre multe suferis de malfacilo kaj mizero. Kaj ĉi-foje, kio atendas la paŝtistojn? En vintro loĝi en travintrejo kaj en somero paŝti sur somera paŝtejo estas vivmaniero de paŝtistoj dum miloj da jaroj. Sed nun oni intencis ŝanĝi ĝin. Paŝtistoj devas migradi sur la stepo. Kiel oni povas loĝi fikse? Tio estas absolute malpermesata vivmaniero por paŝtistoj. Tian vivmanieron ŝatas nur pigruloj!

Ĉu loĝado en tendo estas malfacila? Ĉu paŝtado estas malfacila? Jes, sed tio estas vivmaniero de la paŝtistoj heredata de generacio al generacio dum miloj da jaroj. Ĉu la vivmaniero de la prapatroj devas esti ŝanĝita? Ho vi, damnindaj posteuloj!

Ciren Danba ĉirkaŭrigardis sian tendon kaj suspiris: Ho ve, vi estas ŝirmilo de ni paŝtistoj dum centoj da generacioj. Sed nun vi estos forĵetita kiel rubo...

Ciren Danba ĉiam memoras la devenon de tendo: Antaŭ multe da

jaroj ne estis tendo kaj la prapatroj vivis sub la ĉielo kiel sovaĝuloj. Poste, la prapatroj ne povis elteni froston kaj ŝirmis sin per feloj ĵus deŝiritaj de mortigitaj bovoj, kaj de tiam ekaperis fela robo, kaj tiun sekvis fela tendo. Kaj pli poste, ŝafaj feloj anstataŭis la bovajn kaj tendoj el bovharoj anstataŭis tendojn el bovaj feloj. Sed kio sekvos pli poste?

En la tago de transloĝigo el tendo en tegolitan domon, Ciren Danba foriris frumatene sen trinki teon. Estis tago de larmoj kaj ĉagreno. Ciren Danba neniel volis vidi, kiel liaj idoj malmuntos la tendojn kaj enloĝigos en nekomfortaj tegolitaj domoj. Antaŭ la foriro li nenion diris, ĉar li jam avertis al siaj idoj, kiam ili komencis konstrui domojn, ke li ne enloĝigos en la domo, ke ili restigu por li tendon, litaĵojn kaj te-servicon. Li insistis, ke li mortos en tendo. Li sciis, ke li vivos nelonge kaj ne volas fari krimon kontraŭ la prapatroj.

Sed kiam Ciren Danba malsate pasigis tutan tagon sur malproksima herbejo kaj revenis en mallumo, li estis surprizita, ke malaperis la tendoj, kaj tie restis nur masoj da cindro kaj teraj fornoj.

Ciren Danba refoje ploris kaj ploradis. Kiam li laciĝis de plorado, li revenis al la sidejo de sia tendo kaj sidigis sur la tero, ĉe la forno kiel kutime. Ĉagreno rongis lian koron. Doloro de forlasiteco enpikiĝis en lian koron kiel glavo. Kiel malfeliĉe estis, ke tia malagrablaĵo okazis por maljunulo, kiu vi-

vos ne multajn tagojn.

Alvenis liaj filo kaj nepo kaj iliaj edzinoj.

“Paĉjo, bonvolu transloĝigi en novan domon,” petis la filo kaj bofilino surgenue.

“Avo, en la novaj domoj estas elektra lampo kaj televidilo. Bonvolu enloĝigi en nova domo, komforta lito por vi jam estas pretigita,” petis la nepo kaj lia edzino surgenue.

Kvazaŭ nirvaniĝinta, Ciren Danba sidis senmove kaj direktis la rigardon al la fora obskuro.

La idoj ne sukcesis persvadi lin kaj restarigis por li la tendon sur la sama loko.

Pasis plia tago. Malheliĝis.

Post vespermango kaj tetrinko Ciren Danba sidiĝis apud maso da cindro ĉe la forno, kion li faris en la pasintaj sennombraj tagoj kaj vesperoj. Li tute alkutimiĝis al tia vivo.

Sed en la nokto subite ŝanĝiĝis la vetero, kiu ĉiam estis milda tra la tuta vintro. Muĝadis ventego, galopante sur la vasta sovaĝejo. Frapate de la ventego, la tendo

makabre knaris.

“Ha, tio estas vera vintro, vintro devas esti tia,” Ciren Danba diris al si.

La flirtanta pordkurteno estis levita, enpaŝis la 60-jara filo kaj 40-jara nepo.

“Avo, meteoservo de televizio anoncas, ke ĉi-nokte estos eksterordinare granda neĝo. Bonvolu trankvili en nova domo.”

Ciren Danba sidis senmove en mallumo kiel argila pupo.

“Paĉjo, nur unu nokton vi estu en nova domo. Morgaŭ vi povos reveni en vian tendon...”

“Nenien mi iros! Mi jam diris, ke mi restos en la tendo ĝis morto,” Ciren Danba muĝis al siaj idoj.

La malsukcesintaj filo kaj nepo foriris.

La ventego furiozis ĝis nokto-mezo. Post ventego sur la herbejo regis morta silento.

Ciren Danba sentis dormemon, longe oscedis en mallumo. Li palpe atingis la felajn litaĵojn, demetis la felan robon, sternis la litaĵojn kaj kuŝiĝis. Baldaŭ li endormiĝis.

Ciren Danba vekigis de senĉesa

krakado. Li konsciis, ke krakadon kaŭzis rompiĝado de la stangoj de la tendo. La multe sperta Ciren Danba komprenis, ke falis eksterordinare granda neĝo, kaj la stangoj de la tendo jam ne povis elteni la pezon de la neĝo sur la tendo. Apenaŭ li leviĝis el litaĵoj, lia kapo jam frapiĝis kontraŭ la supro de la tendo kaj li ne povis sin rektigi, ĉar la tendo jam malalte kliniĝis, kvazaŭ ventro de tuj akusonta virino.

Ciren Danba trenis sian nudan marasman korpon en mallumo kaj trovis sian irbastonon en angulo de la tendo. Li levis la bastonon kaj ekbatis per ĝi la plafonon. Tio estis ununura metodo dum miloj da jaroj por forigi neĝon sur la tendo. Tendoj facile disfalis sub la pezo de dika neĝo. Sed la 84-jara Ciren Danba jam estis tro malforta por tion fari. Kiam li la naŭan fojon levis la bastonon, li jam senfortiĝis kaj devis ĉesigi la penadon. Li kurbe staris senfare kaj anheladis. La plafono kliniĝis pli kaj pli malsupren kaj laŭtiĝadis la krakado. Ciren Danba dronis en malespero. “Falu, ke mi estu entombigita en neĝo. Mi jam diris, ke mi volas morti en la tendo...”

Ciren Danba heroe staris, pene subtenante la plafonon per la kapo.

“Kraĉ”, rompiĝis la trabo de la tendo, kaj la nigra tendo malrapide falis, kvazaŭ falus la nigra ĉielo. Instigate de la natura instinkto de memkonservado, Ciren Danba elkuris el la tendo en palpebruma daŭro. Guste kiam la maljunulo elsaltis el la pordo, la tendo komplete disfalis kun obtuza bruo. La lasta nigra punkto sur la herbejo estis englutita de la argenta mondo, malaperis la lasta tendo el nigraj bovharoj sur la herbejo Tawu.

Ciren Danba konsternite staris sola sur la neĝa sternaĵo. Nemalproksime, kie kuŝas la nova paŝtista vilaĝo, impone brilis lampoj... ■



* Caidan estas juna tibet-nacia verkisto, deveninta de Hainan de Qinghai-provinco. Pluraj el liaj noveloj, ekzemple “Lupo sur dezerto” kaj “Familio for de la vilaĝo”, spegulas la vivon de la tibeta popolo.

Vojo de Mia Verkado

de CHUN-CHAN YEH

KIAM mi studis en mezlernejo, mi komencis verki mallongajn artikolojn kaj publikigis ilin en lerneja gazeto aŭ ĵurnaleto. Tamen, mi komencis verki novelojn en 1932, kiam mi lernis en la dua klaso de la fakultato pri alilandaj literaturoj en Wuhan-universitato. 19-jara, mi publikigis mian unuan novelon "Jarfino", kiu estis verkita per Esperanto en miaj vintraj ferioj kaj poste kolektita en mian unuan novelaron "La Forgesitaj Homoj". Siatempe mia plumnomo estis Mar. Tiu libro, eldonita en 1937, interesis multe da japanaj kaj alilandaj esperantistoj eble pro tio, ke antaŭ mi neniu orientano verkis novelaron Esperante. Ĝi apartenas al la internacia Esperanta literaturo. En la libroj kaj artikoloj pri la Esperanta literatura historio, skribitaj en aliaj landoj, estas menciita la novelaro. La eldonado de tiu ĉi libro pli-malpli helpis min suriri literaturan

vojon.

Kial mi verkis Esperante? Tio estis decidita de tempo kaj medio, en kiuj mi vivis.

Mi naskiĝis en neriĉa kamparana familio kun ĉ. 1 hektaro da tero. Kiam mi vizitis privatan lernejon, mi devis iom partopreni en agrikultura laboro en postleciona horo. Kiam mi estis 14-jara, mi forlasis la vilaĝon por viziti mezlernejon en granda urbo, tamen mi neniam forgesis la kamparan vivon kaj vilaĝanojn. Malpli ol du jarojn poste, t.e., en 1931, Japanio agesis la tri provincojn de nordorienta Ĉinio. Al la kamparanoj mankis agroj. Ili eĉ ne povis sin vivteni, kvankam ili tutjare penlaboris sur kampoj. La ekspluatado fare de bienuloj kaj burokratoj, multjara milito, dumpingo de alilandaj varoj sur la ĉina merkato kaj bankroto de la kampara ekonomio alportis al ili grandan mizeron. En urboj kvartalo koncesiita

Chun-Chan Yeh (meze) kaj ĉinaj veteranaj esperantistoj



al alia lando fariĝis lando en lando; ĉie sur merkato vendiĝis alilandaj varoj. Malprosperis la lokaj industrioj kaj komercoj; estis multaj senlaburoj; senbride tiranis militaristoj kaj burokratoj; kaj patriotaj studentoj havis la danĝeron esti arestitaj de ĝendarmoj kaj policanoj en ĉiu ajn tempo. Ĉio ĉi tio montris, ke Ĉinio estis disfalanta. Kion fari fronte al tiuj cirkonstancoj? Kiel 16-17-jara junulo, mi estis tre ĉagrenata kaj korpremata. Kiam mi venis en la grandan urbon kaj vidis ian materian civilizacion el aliaj landoj, mi volis lerni matematikon, fizikon, kemion kaj fremdan lingvon por poste savi la landon per sciencoj. Tamen, la nova stato ŝanĝis mian ideon, precipe post kiam mi legis la rakonton pri Lusin, kiel li forlasis medicinan lernadon kaj komencis fari literaturan verkadon.

Mi decidis okupiĝi pri literatura verkado, ĉar mi sentis, ke niaj lando kaj popoloj, precipe kamparanoj, estas forgesitaj de la mondo, kaj ke mi havas la devon aŭdigi al la mondaj popoloj, precipe al tiuj subpremataj, la voĉon de la ĉina popolo. Tiam mi jam legis iom da literaturaĵoj de subpremataj malfortaj kaj malgrandaj nacioj, rekomenditaj de ĉinaj famaj verkistoj. Ankaŭ mi volis fari ion en tiu flanko per literatura verkado. El la literaturaĵoj mi trovis, ke iuj estas Esperantigitaj de intelektuloj de tiuj malfortaj kaj malgrandaj nacioj kaj poste tradukitaj el Esperanto en la ĉinan lingvon. El tio rezultis, ke Esperanto estas ilo utila al la literatura interŝanĝo de tiuj nacioj, tial mi decidis verki Esperante.

Mi komencis diligente lerni Esperanton por posedi ĝin. "Jarfino" estis praktiko de mia decido. Estas menciinde, ke sub la reakcia regado de Kuomintang, Esperanto estis rigardata kiel "danĝera lingvo" pro la aparta interrilato inter Esperanto kaj la subpremataj malfortaj kaj malgrandaj nacioj. Tial, mi devis kaŝe lerni Esperanton kaj kaŝe verki per la lingvo. Tamen, tio ne ŝancelis mian decidon, precipe post kiam mi legis jenajn vortojn de Lusin.

"Mi estas mem konvinkita, ke mi aprobas Esperanton. Tio estas de tre longe, probable de 20 jaroj, tamen laŭ mia nuna memoro la motivo ŝajnas tre simpla:

1. Ĉar ĝi povas unuigi ĉiujn homojn en la mondo, precipe la subprematajn;
2. Pro propra profesio, eble ĝi povas servi al interkonigo de literaturoj;
3. Pro tio, ke mi vidas kelkajn esperantistojn, kiuj estas super la hipokritaj egoistoj."

La novelo "Jarfino" priskribas la vivon de iuj ordinaraj homoj en la malnova Ĉinio. La vivo estis griza kaj reala por la plejparto de la homoj



Verkoj de Chun-Chan Yeh

vivantaj en malsupraj socitavoloj siatempe. Kompreneble, tiuj homoj kaj ilia vivo estos forgesitaj, ĉar la ĉina popolo ne vivos tiel por ĉiam. Tial, mia novelaro, kiu inkluzivas "Jarfino", titoliĝas "La Forgesitaj Homoj". Nun tia vivo jam fariĝis historio kaj neniam reaperos. Ĝuste pro tio, la vivo ŝajnas esti neforgesinda, ĉar ĝi spegulas la historian periodon de nia popolo.

Post tio mi suriris literaturan vojon, iom malsaman ol tiu de ordinaraj verkistoj. De tiam verki en fremda lingvo estas mia ĉefa literatura aktivaĵo kaj en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj en mia restado en Eŭropo. En Esperanto kaj la angla lingvo mi verkas novelojn, romanojn kaj artikolojn, kaj tradukas verkojn de ĉinaj verkistoj. Tamen, mi ĉiam havis unu celon konigi al niaj legantoj la vivon kaj batalon de la ĉina popolo.

Radikale ŝanĝiĝis la stato de Ĉinio post la Liberigo. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la forgesitaj homoj renversis la regadon de la "tri grandaj montoj" — imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kaj fondis la novan Ĉinion. Ni ne plu estas subpremata malforta kaj malgranda nacio, tial mi opinias, ke mi devas traduki alilandajn literaturaĵojn en la ĉinan lingvon kaj verki por nia popolo per la patrina lingvo. Tamen, mi ankoraŭ uzas fremdan lingvon por konigi al alilandaj legantoj ĉinajn klasikajn kaj modernajn literaturaĵojn. De 1950 ĝis 1974 mi okupiĝis pri kompilado de la gazeto "Ĉina Literaturo", kiu nun eldoniĝas en la angla kaj franca lingvoj. Nun mi jam ĉesis fari tiun laboron, tial mi havas pli da tempo por verki novelojn kaj prozaĵojn. Kvankam maljuna, tamen mi sentas, ke senlime plezuriga estas la "subiranta suno", ĉar mi vivas inter la grandaj popoloj de la granda lando kaj verkas en la ĉina lingvo, kiu havas longan historion. ■

Braun

de CHEN YUAN

EN 1935 aŭ 1936 Braun estis sendita de la redakcio "Literatura Mondo" al Hongkong por presi Esperantajn librojn, ĉar tie la presa kosto estis malpli multa ol tiu en Eŭropo. "Literatura Mondo" estis granda gazeto redaktata de fame konataj esperantistoj Kálmán Kalocsay¹ kaj Julio Baghy². Kalocsay iam petis Sun Yong sin turni al Lusin, ke ĉi tiu kontribuu por la gazeto³. Ĉina samideano Saint Jules Zee ofte publikigis en plumnomo siajn Esperantajn tradukojn en la gazeto kaj renomiĝis en la mondo. Li skribis⁴:

"En la komenco de la 30-aj jaroj mi estis komentanto, esperantigis antikvajn poemojn kaj ilin publikigis en 'Literatura Mondo' redaktata de Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy. Tio por mi estis unua provo, sed granda kuraĝigo."

Tiam mia hejmo estis en Hongkong, sed mi studis en Zhongshan-universitato en Kantono. Kiam mi revenis al Hongkong por viziti miajn gepatrojn, mi vidis Braun, la duan hungaran esperantiston, kun kiu mi kontaktiĝis kiel studento. Braun loĝis en apartamento en Hongkong, kiu estis pli luksa ol mia hejmo. En lia gasteĉambro stariĝis vinŝranko. Mi unuafoje trinkis ĉe li fremdlandan vinon. Li estis pli aĝa ol mi je dekelkaj jaroj, tamen ni interparolis intime. La sekreto por posedi Esperanton eble estas babili kun alilandaj esperantistoj pri ĉiutaga vivo, sociaj novaĵoj, aktuala situacio kaj eĉ pri moroj de diversaj landoj kaj personaj ŝatokupoj. Ni babilis pri ĉio eleganta kaj vulgara. Iom post iom mi parolis Esperanton flue kvazaŭ senpense, fakte mi pensis en Esperanto anstataŭ en mia gepatra lingvo. Tiam Esperanto ŝajnis la gepatra lingvo. Du hungaroj — Fedorĉak kaj Braun — instruis al mi kiel babili Esperante. Jen la kaŭzo, kial post 50 jaroj, kiam mi partoprenis konferencon pri informadiko en Hungario, mi ĉie demandis pri ili, sed sen rezulto. Neatendite, unu jaron post kiam mi revenis en la hejmlandon, iu hungara sciencistino skribis al mi, ke Braun ankoraŭ vivas kaj post la emeritiĝo li loĝas en Kalifornio, Usono, kaj sciigis al mi lian adreson. Mi skribis leteron al li, sed venis al mi neniun informon. Tio ĉagrenis min longan tempon.

Mi kaj Braun estis ne nur ordinaraj amikoj, sed ankaŭ kunbatalantoj kontraŭ agresantoj. Li estis honesta kaj justama. En 1937 japanaj militaristoj agredis Ĉinion. Li skribis al mi kun granda indigno

kontraŭ tio. Li invitis min al Hongkong por konigi al mi sian planon. Li intencis eldoni internacian Esperantan gazeton kontraŭ la japanaj agresantoj. Ni interparolis korverŝe. Mi ne sciis, en kiu nomo li petis la registaron de Hongkong pri registro de la gazeto. Tamen post nelonge aperis la unua numero. Tiam estis la komenco de 1938. La gazeto portis la nomon "Orienta Kuriero". Mi estis tre naŭva kaj proponis diversajn vervajn aŭ simbolajn nomojn por la gazeto, kiujn li ne aprobis. Li opiniis, ke por akiri simpatian de la tutmondaj popoloj la gazeto devas esti nek dekstra nek maldekstra, ankaŭ ĝia nomo devas esti ordinara. La gazeto sen incito povas gajni kiel eble plej multe da legantoj. Kompreneble li estis prava. Fine ni elektis "Orienta Kuriero" el 3-4 proponitaj nomoj. La gazeto estis 100-paĝa, 2-kolumna, kun ĉiu artikolo komencita en nova paĝo, en tridekduonfolia formato, kiel la gazeto "Diĝestoj por Legantoj" en pli ol 20 lingvoj. Mi forgesis, kiuj kontribuis por la gazeto. (En 1983, kiam mi vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, mi ne havis tempon por esplori, kiom da numeroj tiu gazeto eldonis.) Inter miaj kontribuoj por la gazeto troviĝas, krom tradukoj, ankaŭ longa artikolo, kiu analizas la ekonomian bazon de Ĉinio por la longdaŭra rezistmilito, en plumnomo simila al tiu de anglo. En 1939 la Esperanta gazeto "Voĉoj el Oriento" redaktata de Tikos transiris de Wuhan al Hongkong por eldonado kaj, laŭdire, ankaŭ li kunlaboris kun Braun. Tiam Kantono jam estis okupita de malamikoj. Post kiam mi forlasis Kantonon, mi ne povis korespondi kun Braun. Iuj konfuzis la du gazetojn, ĉar ili ne konis la fakton. Mi ne sciis, kiam ĉesis eldoniĝi "Orienta Kuriero", sed la brila figuro de tiu justama esperantisto-batalanto nun ankoraŭ profunde restas en mia memoro. ■

1. Kálmán Kalocsay (1891-1976), hungara kuracisto, eklernis Esperanton en 1911. Li estis granda Esperanto-poeto kaj ĉefredaktoro de "Literatura Mondo". Liaj verkoj kaj tradukoj estis tre multaj.

2. Julio Baghy (1891-1967) estis hungara verkisto kaj ankaŭ li lernis Esperanton en 1911. Lia novelo "Printempo en la Aŭtuno" estis ĉinigita de Bakin kaj konata de ĉinaj legantoj.

En 1937 "Literatura Mondo" publikigis "Arĝentan Duopon" memore al ili; en 1966 ankaŭ la Hungara Esperanto-Asocio eldonis "Oran Duopon" samcele.


3. Vidu leteron skribitan de Lusin al Sun Yong en la 23-a de novembro 1931.

4. Vidu "Mia Sperto en Esperantigo de Ĉinaj Poemoj" de S. J. Zee.

Vinbero Chang

Teksto kaj fotoj de WU XINHUA

Metiartistino Xiao Xiufang



Vitraj vinberoj

“Vinbero Chang” estas la nomo de antikva metiejo de Pekino.

Antaŭ 100 jaroj en Pekino vivis mongola metiartisto Chang Zai. La vitraj vinberoj faritaj de li estis mirinde ĉarmaj kaj pro tio li ricevis tabulon kun ora surskribo de imperiestra patrino Cixi, kaj liaj vitraj vinberoj estis honoritaj per unua premio en la Panama Internacia Foiro en 1914. Poste, kvin knabinoj de Chang-familio decidis neniam edziniĝi por okupiĝi pri la metio. Ili estis famaj kvin knabinoj de la metiejo. En 1985 mortis Chang Yuling, la lasta membro de Chang-familio. Feliĉe, ŝi jam incis sian metilernantinon Xiao Xiufang pri la tekniko, ke ŝi povis diskoniĝi poste. Nun ŝi ĉiam pli perfektigas kaj per ŝi oni faras vitrajn vinberojn originalajn en Ĉinio.

SENLABORECO MILDIGITA EN ĈINIO

En la pasintaj 10 jaroj de reformado kaj pordomalfermo grandiĝis la skalo de la ĉina ekonomio, kio havigis al ĉinoj pli da laborŝancoj.

Nun la unutaga produktovaloro de la industriaj entreprenoj de Ĉinio atingis 5 miliardojn da juanoj, sed tiu en 1978 estis nur 1.16 miliardoj da juanoj. La nombro de la ĉinaj laboristoj pliiĝis de 95 milionoj antaŭ 10 jaroj al 140 milionoj, kaj la produktiveco kreskis je pli ol 50%. Tio montras, ke laborŝancojn alportis la grandiĝo de la ekonomia skalo. Precipe la ekonomia disvolviĝo en urboj en la pasintaj 10 jaroj iom post iom malaperigis 5.3 milionojn da senlaboruloj, kiom estis en 1978, kaj ebligis al nemalmultaj el la dekoj da milionoj da kamparanoj, kiuj ne plu okupiĝas pri terkulturo, labori en urboj.

La reformado donis al senlaboruloj multe da laborŝancoj. Laŭ laborkontrakto entreprenoj kaj novaj laboristoj havas rajtojn de elekto kaj elektigo. Dank' al malfermo de labormerkato, fluo de laboristoj fariĝis necesa ekonomia aktivado — sudorientaj Zhejiang-anoj iris al la nordoriento aŭ nordokcidento por prilabori vaton kaj fliki ŝuojjn; Sichuan-aj kamparanoj torentis al la najbara provinco Guizhou kaj fariĝis aktivaj laborantoj; sciencistoj kaj teknikistoj iris al kamparo por fondi fabrikojn por kamparanoj; ktp.

Pro reformado de laborsistemo iuj estas elkribritaj aŭ pro bankroto de siaj entreprenoj ricevas helpon de la socio, sed tiuj estas malmultaj. En la lastaj jaroj la procento de senlaboruloj en Ĉinio neniam atingis 5.3% kiel en la jarfino de 1978.

34 000 LAMAOJ EN TIBETO

En la Tibeta Aŭtonoma Regiono en ĉiu sesdeko da loĝantoj estas unu lamao.

Laŭ statistiko de la Tibeta Budhisma Asocio, en Tibeto kun 2.2 milionoj da loĝantoj estas 34 680 lamaoj, kaj Zhebang-templo, unu el la tri grandaj temploj (Dazhao, Zhebang, Sela) en Lhasa, jam havas pli ol 700 lamaojn.

Tibeto donas grandan atenton al disvastigo de lamaismo. En la pasintaj 10 jaroj la registaro asignis 34 milionojn da juanoj por ripari 1 459 templojn kaj sutrohalojn.

Krome, la Tibeta Budhisma Asocio fondis en 1985 sutro-presejon, kiu jam presis 7 450 volumojn de "Kanjur", unu el la du partoj de "Sanktaj Skriboj", kaj grandan kvanton da sutroj kaj budhoportretoj. Por diskonigi sutrojn de generacio al generacio, diversaj temploj de Tibeto funkciigis sutro-kursojn kaj ĝis nun ili jam kulturis pli ol 3 000 personojn.

100 ĈINAJ VIRINOJ RICEVIS EMINENTAN POSTENON

La Pekina Generala Kompanio por Servo al Alilandaj Entreprenejoj estas ununura kompanio, kiu liveras dungitojn al institucioj de alilandaj komercistoj en Pekino. De la fondiĝo en 1979 ĝis nun la kompanio sendis 1 600 virinojn kiel dungitojn. La nombro konsistigas 45% de la totala nombro de senditaj dungitoj.

Koncerna sinjoro de la kompanio diris, ke en la pasintaj 10 jaroj la laboro de dungitaj virinoj estis laŭdata de alilandaj komercistoj. Tiuj virinoj sufiĉe montris sian talenton. Multaj el ili laboras kiel interpretistoj, inĝenieroj kaj direktoroj de tiu aŭ alia fako. Iuj eĉ ricevis la oficon de ĉefdeligito, la plej altan postenon en institucio de alilandaj komercistoj en Ĉinio. Laŭ nekompleta statistiko, nun almenaŭ 100 virinoj ricevis eminentan postenon en institucioj de alilandaj komercistoj en Pekino. Ekz. Zhang Qisi, ĉefdelegito de iu finnlanda kompanio en Pekino, respondacas pri ĉiuj ĝiaj laboroj en Ĉinio. Pro sia elstara laboro ŝi estis multe laŭdata de ĝia stabo kaj akiris konfidon de ĝiaj komercistoj. Chen Deren, direktoro de la kancelario de la oficejo de la aviada kompanio Boeing de Usono en Pekino kaj supera ekonomikistino, posedas du fremdajn lingvojn. La kompanio alte taksis ŝian talenton. Aliaj dungitaj virinoj estis senditaj de japanaj kaj usonaj komercistoj al iliaj landoj por labori en la stabo aŭ ricevi trejnadon.

KARAKTERIZAĴOJ DE LA ĈINA MEDICINO

La ĉinoj amas la ĉinan medicinon kaj ĉinajn medikamentojn por jenaj kaŭzoj:

Unue, la tuteco de la ĉina medicino. La ĉinmedicinistoj kuracas ne sole malsanan korpoparton, sed samtempe reguligas la korpofunkcion kaj levas la rezistecon kaj imunecon. La ĉina medicino emfazas la kuracan vidpunkton en ĝia tuteco kaj en longtempa klinika praktiko oni observas malsanulon laŭ la ĉielo, tero kaj korpo. La ĉina medicino opinias, ke malsanojn kaŭzas ne nur naturaj faktoroj de vivaĵoj, sed ankaŭ psikologiaj kaj sociaj faktoroj. Ĉar la kaŭzoj de malsanoj estas multflankaj, tial la ĉinmedicinistoj faras kuracadon tutkorpan kaj multflankan. Ili uzas naturajn drogherbojn kaj metodojn kvietigi la menson, plibonigi la temperamenton kaj doni konsolojn, por ke la malsanulo reakiru la ekvilibron de fiziologio kaj psikologio. La teorio de la ĉina medicino opinias, ke la fiziologia kaj psikologia fenomenoj de homa korpo, kiel unueca tuto, estas nedisigeblaj. La fiziologia kaj psikologia aktivadoj estas unueca tuto de reciproka influo; se ili estas disigitaj, la homa vivo ĉesas.

Due, fleksebla metodo de diagnozo de la ĉina medicino bazita sur simptomoj. La ĉinmedicinistoj donas malsamajn receptojn por sama malsano kaj malsamaj simptomoj, malsamajn receptojn por sama malsano kaj malsamaj pacientoj; kaj malsamajn receptojn por sama paciento kaj malsamaj tempoj kaj lokoj, t.e. ili adoptas malsamajn kuracmetodojn por malsamaj pacientoj kaj malsamaj lokoj kaj tempoj. Krome la kuracmetodoj de la ĉina medicino estas simplaj, tial ili estas facile akcepteblaj de pacientoj.

Trie, la ĉina medicino uzas apartajn terapiojn. Ĝi aplikas, krom perbuŝaj kaj topikaj medikamentoj, ankaŭ akupunkturon, mokson, masaĝon, ĉigong-on kaj kupadon por atingi la celon de resanigo.

Kvare, la ĉinaj medikamentoj havas sciencajn receptojn. En longtempa batalo kontraŭ malsanoj, nemalmultaj ĉinmedicinistoj laŭ la karakterizaĵoj de ĉinaj medikamentoj resumis teorion kaj metodojn prepari ĉinajn medikamentojn kaj ricevis bonan efikon en kliniko.

Krome, la ĉinaj medikamentoj estas naturaj kaj post prilaborado ili konservas la naturan vivecon kaj havas tre malmulte da veneno kaj malbona efiko, ke ili estas tre bonvenaj.

ESP-NOVAĴOJ

● Sub la aŭspicioj de la Hainan-a Koresponda Instituto pri Praktika Esperanto la unua internacia ekonomia kaj komerca simpozio en Esperanto ekfunkciis la 20-an de novembro 1990 en Zhongshan-universitato de Kantono.

● La sesa E-kurso, funkciigata de la Qingdao-a Oceanografia Universitato, finiĝis januare ĉi-jare. En ĝi lernis 75 studentoj de la dua, tria kaj kvara klasoj de la fakultatoj oceanografia, fizika, kemia, biologia, geologia, akvoproduktaĵa, mangaj-prilabora, fiŝkapta, ekonomio-administra, komputila, inĝenieria, fremdlingva kaj soci-sciencia. Ĉiu lernanto gajnis du poentojn.

● Fine de 1990, invitite de Hainan-universitato, vicprezidanto de la Esperanto-Asocio de Hainan-provinco faris prelegon sub la titolo "Esperanto en disvolviĝo". Post tio, pli ol 200 studentoj sin anoncis al la E-kurso funkciigata de la universitato.

● La ekonomia kaj komerca Esperanto-grupo Entrepreno de Sovaga Ĉevalo, fondita de Hainan-aj esperantistoj, havas kontakton kun 157 industriaj kaj komercaj entreprenoj de 73 landoj kaj regionoj, kaj 54 enlandaj industriaj kaj komercaj entreprenoj apartenas al la reto de la entrepreno.

● La Dua Konferenco de la Pekina Federacio de Soci-sciencaj Asocioj okazis en Pekino la 28-an kaj 29-an de novembro 1990. Vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Pekina Esperanto-Asocio Zen Hoy-aŭ estis denove elektita kiel membro de la komitato de la federacio.

● En la lasta decembro prezidanto de la Esperanto-Ligo de la Mongola Popola Respubliko s-ro J. Ganbat kaj ĝia ĝenerala sekretario N. Mjagmarhuu venis al Pekino kaj vizitis la Ĉinan Esperanto-Ligon, re-

dakcion de El Popola Ĉinio kaj Ĉinan Esperanto-Eldonejon, kun la deziro, ke ĈEL kaj EPC helpu ilin en Esperanta instruado. La Ĉina Esperanto-Eldonejo donacis al ili librojn.

● Franca esperantisto P. Berlot vizitis la urbon Sanming de Fujian-provinco en la 29-a kaj 30-a de oktobro 1990. Akompanate de gvidantoj de la magistrato kaj la Junulara Esperanto-Asocio de Sanming, li vizitis la Laboristan Kulturdomon, kemiindustrian fabrikan kaj postlaboran universitaton de la urbo kaj interparolis kun membroj de la Esperanto-asocio.

● Akorde al tio, ke la Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko de Ĉinio emisiis specialan poŝtmarkon memore al la Jaro de Ŝafo la 5-an de januaro 1991, la poŝtoficejo de Changshu, Jianguo-provinco emisiis memorkoverton kun Esperanta stampo, projektitan de veterana esperantisto Zhang Linrui.

● Post dujara preparado la Zhangye-a Esperanto-Asocio de Gansu-provinco fondiĝis la 15-an de decembro 1990. Ĝia prezidanto estas Wang Fu.

● La Yiyang-a Esperanto-Asocio de Hunan-provinco fondiĝis en la 15-a de decembro 1990. La fondkunvenon ĉeestis ĉ. 100 personoj. Pri tio raportis la televida stacio, radiostacio kaj ĵurnaloj de la urbo.

● La Zhongshan-a Esperanto-Asocio de Guangdong-provinco fondiĝis en la Novjara Tago de 1991. Vicurbestro Jian Qinghua estis elektita kiel ĝia prezidanto, kaj Chen Yongxi kiel estro de ĝia konsilantaro.

● Pola Radio ekde la 10-a de januaro 1991 aŭdigas 3 elsendojn ĉiutage: 15:30, 17:30, 21:30 h. Detalan program-informilon oni povas ricevi ĉe: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, Box-46, Pollando.

● La Esperanta Printempo pasigos semajnon en Vieno, Aŭstrio kaj



Franca s-ano P. Berlot kaj samideanoj de Sanming

samtempe partoprenos la internacian kolokvon "La Originala Literatura" en la 19-a ĝis 22-a de aprilo 1991. Post tio vi povos utiligi vian restadon en Mez-Eŭropo aligante al la Esperanto-semajno en Poprad, Ĉeĥoslovakio, kies temo estos "La naskigo de lingvo: La unuaj jaroj de Esperanto" (23-a ĝis 28-a de aprilo).

● La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) celas helpi instruistojn ĉie en la mondo aŭ instrui la Internacian Lingvon aŭ uzi ĝin por interŝanĝi profesiajn spertojn. Ĝiaj anoj ne devas instrui Esperanton, sed devas interesiĝi pri sia profesia laboro, instruante kiun ajn studobjekton, kaj deziri informi kaj informi pri instruado ĝenerale kaj tutmonde.

Kontaktoj inter la anoj okazas pere de la Internacia Pedagogia Revuo, pere de naciaj kaj internaciaj seminarioj, kaj pere de la ĉiujaraj konferencoj.

Aniĝu al ILEI kaj aligu al la venonta Jubilea 25-a Konferenco de ILEI, kiu okazos en Voss, Norvegio, tuj post la Universala Kongreso.

● Esperanto-klubo en la urbo Senica organizos la dekan Paroligan Semajnon de la 21-a de julio 1991 ĝis la 27-a de julio 1991. Ĝi okazos en la slovakia urbo Senica. Celo de la semajno estas paroligi ĉeestantojn, perfektigi ilin en Esperanto kaj disvastigi sciojn pri E-movado. Adreso por la aligiloj: Anna Hornakova 313/19, 905 01 Senica, ĈSFR. Telefono: X 42 802 4722.

La fondkunveno de Zhongshan-a Esperanto-Asocio



S-ro J. Ganbat (la dua de dekstre) kaj s-ro N. Mjagmarhuu (la tria de dekstre) gastas en la redakcio de EPC.



Popolaj dancoj de Ĉinio

Teksto kaj fotoj de HAN HONG


La lastan aŭtunon oni prezentis en Pekino grupon da buntaj popolaj dancoj kreitaj de la Pekina Dancarta Instituto. Ili karakteriziĝas per klara stilo de arto, densa etoso de epoko, forta gusto de vivo kaj aparta aranĝo, kio vekis grandan eĥon ĉe la rigardantoj. La artistoj invitate turneis en Usono kaj Japanio kaj estis laŭdataj en la danca festivalo de dancartaj institutoj okazigita en Hongkong.

La danco "Ĉe Mengdong-rivero" prezentas la amaferon de mjaŭ-aj gejunuloj. Ĉe fajroj kaj sub banjanoj ili verŝas sian koron unu al la alia.

La danco "Amo en Pluvarbaro" priskribas la amaferon de taj-aj gejunuloj. Ili frapas tamburon en formo de elefanta kruro. La frapado vekas la pluvarbaron kaj la bruado de lignaj pantofloj rompas la silenton en la arbaro.

La homoj vivantaj sur la Leŭsa Altebenaĵo estas honestaj. La danco "Gefiloj de la Flava Rivero" esprimas profundajn sentojn de gefiloj de la Flava Rivero per troigitaj kaj ritmaj dancmovoj.

Krome, estis prezentitaj ankaŭ la mongola danco "Moroj de Aoter", gaja danco "Spektado de *Jangge*-danco" kaj kortuŝa danco "Rivero de Filinoj", kiuj estas plenaj de loka gusto.



Sceno el la danco "Rivero de Filinoj"

Sceno el la danco "Edziniĝo"






Sceno el la danco "Spektado de *Jangge*-danco"

Sceno el la danco "Verdo"

Foto de LI CHUNGENG

Sceno el la danco "Amo en Pluvarbaro"



Gimnastiko kontraŭ gastroptozo

(II)

5. Kuŝu sur la dorso. Kurbigu samtempe la krurojn, tenu la genuojn per ambaŭ manoj kaj levu ilin supren laŭeble. Demetu la manojn kaj levu la piedojn, rektigu la krurojn kaj enspiru, malrapide mallevu la krurojn kaj elspiru. Tion kontinue faru 6-8 fojojn.

6. Kuŝu sur la dorso. Levu la krurojn je 30 gradoj kaj fleksetu ilin. Rektigu la maldekstran kruron kaj kurbigu la dekstran. Alternigu la krurojn dekstran kaj maldekstran. Tion kontinue faru 6-10 fojojn.

7. Kuŝu sur la dorso. Levu la manojn horizontale. Levu la maldekstran brakon je 90 gradoj for de la lito kaj turnu la supran parton de la korpo dekstren. Frapetu la dekstran manon per la maldekstra kaj reprenu la originan pozon. Alternigu la brakojn dekstran kaj maldekstran. Tion kontinue faru 6-8 fojojn. (Atentu, ke dum la ekzercado vi ne devas movi la malsupran parton de la korpo, nek levi la kapon.)


8. Kuŝu sur la dorso. Levu la supran parton de la korpo ĝis duonsidiĝo. Tenu ĝin je 45 gradoj

for de la lito. Levu la brakojn antaŭen kaj enspiru. Denove kuŝu kaj elspiru. Faru tion kontinue 6-10 fojojn.

9. Staru sur la lito kaj fleksu la genuojn. Levu la koksojn kaj talion. Kuntiru la anuson kaj enspiru. Reprenu la originan pozon kaj elspiru. Kontinue faru tion 6-10 fojojn.

10. Levu la brakojn supren kaj enspiru. Fleksu la maldekstran gambon kaj levu la supran parton de la korpo ĝis sidiĝo. Tenu la maldekstran gambon per ambaŭ manoj kaj elspiru. Denove prenu la originan pozon kaj alternigu la gambojn dekstran kaj maldekstran. Faru tion 6-8 fojojn.

11. Kuŝu sur la dorso. Nature etendu la brakojn ambaŭflanken de la korpo. Milde fermu la okulojn kun rideto por malstreĉi la vizaĝajn muskolojn. Enspiru per la nazo kaj elspiru per la buŝo. Spiru longe, malforte kaj malrapide kaj dum elspirado malstreĉu vin de la kapo ĝis la fingroj manaj kaj piedaj kaj liberigu vin de ĉia penso. Tion faru kontinue 5-10 minutojn.




7



8



9




10



11



5



6

Kamparana pentrarto


de CHEN SI

LA ĉinstila pentrarto ne estas la sola reprezentanta speco de la ĉinaj tradiciaj pentrartoj. En la vasta kamparo de Ĉinio troviĝas la kamparana pentrarto samaĝa kiel la ĉinstila pentrarto.

La kamparana pentrarto odoras per forta loka originaleco. La pentraĵoj de tiu stilo spegulas ĉefe la morojn kaj vivkutimojn de malsamaj nacioj kaj malsamaj lokoj. En ĉi rubriko vi vidas kelke da tiaj verkoj. "Viktimo" montras religian kulton de nacimalplimulto en sudokcidenta Ĉinio. Virinoj en belaj vestoj krias kaj rigardas, kiel bravaj junuloj atakas incititan bovon



En Boato de WU ZHENGKUI



Vilaĝo antaŭ Bambuaro de RUAN SIDI

per hakilo kaj ponardo. “Bano sub la Ĉielo” montras, ke kelke da sanaj kamparaninoj de norda Ĉinio baniĝas en rivereto. En la lastaj jaroj disvolviĝis la kamparana pentrarto. Aperis pli kaj pli multaj verkoj spegulantaj la diligentan laboron kaj feliĉan vivon de ĉinoj. Tion ekzemplas “Fiŝbaseno”.

La kamparana pentrarto emfazas la espriman povon de pentrado kaj la principon “peniko sekvas la deziron”. La realaĵoj ofte estas transformiĝe troigitaj kaj senregule grupigitaj laŭ la temo de la aŭtoroj. Ekzemple la pentraĵo “Paŝtoknaboj” ebenigis la tridimensiajn objektojn kaj prenis la ruĝan koloron por esprimi varman kaj gajan atmosferon. En la verko “Vilaĝo antaŭ Bambuaro” birdoj, prosperaj folioj de bambuoj kaj piramide kunmetitaj domoj figure profetis la riĉecon kaj gajecon de la vivo. Multaj rigardantoj pretervole ligis tiujn pentraĵojn kun la verkoj de la kubisma majstro Pablo Picasso kaj nomis la kamparanajn pentraĵojn primaraj verkoj de modernismo.


Kiel estiĝis tiuj belaj inspiraj pentraĵoj de kamparanoj? Tio rilatas al kutimoj de ĉinoj. Same kiel Kristnasko ĉe la okcidentanoj, la Printempa Festo (ofte en februaro) estas la plej grava festo por ĉinoj. Ĉe la festo oni benas por la nova jaro kaj ornamas la pordojn aŭ murojn en la ĉambroj per bildoj de pordodio kaj dio de riĉeco. Nutrate de la popola moro, evoluis la pentrarto de kamparanoj kaj fariĝis memstara artospeco el sole vulgara ornamaĵo.

La pentrarto ŝatata de la kamparanoj floras en la ĉina kamparo. Ĝi plej viglas en Jinshan-gubernio de Ŝanhajo, Panshi-gubernio de Jilin-provinco, Lunan-gubernio de Yunnan-provinco kaj Ansai-gubernio de Shaanxi-provinco. Post laboro kamparanoj ĝoje pentras por montri siajn travivaĵojn. Iliaj pentraĵoj trovas ŝaton ne nur en la kamparo, sed ankaŭ en urboj de Ĉinio. ■



Viktimo de YANG YUNFU

Fiŝbaseno de YAO ZHENZHU





Paštoknaboj de ZHANG FENGLAN

Bano sub la Ĉielo de LIU ZHAO'E



HUMURAĴOJ

Edzo: Hieraŭ vespere vi ĝuis operon. Kion vi vidis?

Edzino: Multon. Sinjorino Blan tinkturis al si la kapharojn. Gesinjoroj Smith volas eksedziĝi. La familio de Vitte bankrotas. Kaj...

* * *

—Mia kara, manĝu iom da spinaco. Tio povas aldoni koloron al viaj vangoj.

—Sed, panjo, al kiu plaĉas verdaj vangoj?

* * *

MALAMI MONON KIEL MALAMIKON

Du mallaboremuloj babilas.

“Mi malamas monon kiel malamikon. Kaj vi?”

“Prave. Pro mono iuj eĉ perdis sian vivon.”



“Tial mi elspezas monon, tuj kiam mi havas ĝin.”

“Tre bone! Vi ekstermas la malamikon komplete.”


“Tamen, se oni ne vidos sian malamikon dum longa tempo...”

“Kia ĉagreno!”


LUDO

Ĉu vi povas unustreke fari tiun ĉi desegnon?

(Solve trovebla en ĉi numero)



KARIKATURO



Kunagado de ZHANG AN

(Daŭrigo de p. 35)

Mi respondis al li, ke mi tre ĝojas ne ŝanĝi mian antaŭan vivmanieron. Mi estis feliĉa, ke mia antaŭa memfido ne fariĝis antaŭjuĝo, mi ne bedaŭris la pasintajn kaj ĉio nova ne estas fremda por mi. La progreso gratulindas. “Sed io konata tamen...”

“Fremdiĝis al vi, ĉu ne?” Transpreninte mian paroltemon, li diris, ke antaŭe oni opiniis, ke ju pli da homoj, des pli da sukcesoj. Sed nun la loĝantaro de la kamparo kreskas tro rapide kaj la kontraŭdiro inter loĝantaro kaj agraro akriĝas tago post tago. De 1981 ĝis 1988 la areo de agroj reduktiĝis je 9.49 milionoj da hektaroj, dume la loĝantaro kreskis je 6.347 milionoj. En la kamparo aperis armeo da superflua laborfortoj kaj sekve estis pli malfacile doni laboron al urbanoj. Kaj ankoraŭ ne estas solvitaj la problemoj, kiel ekzemple, la bazo de agrikulturo estas malforta kaj ĝiaj ekipaĵoj malmalmodernaj, malfacileco por altigi produktivecon pligrandiĝas; mankas scienca-teknika povo por plue prilabori agrikulturajn kaj neagrikulturajn produktaĵojn; iuj entreprenoj ne havas sufiĉan monon, kio malhelpas ilin disvolvi kaj reformi sin; kaj malmalmoderneco de la terciara industrio ne akiris radikalan ŝanĝon.

Antaŭe la trafiko kaj komunikado en Hunan estis malfacilaj. Tio alportis al turistoj egan maloportunon. Nun la provinco fervege ligiĝas kun diversaj partoj de la lando kaj ĉefaj havenoj ĉe la marbordo. En ĝi funkcias 21 aeralinioj. La nova flughaveno Huanghua malfermis la linion al Hongkong. Oni komuniĝas en ĉiu ajn tempo kun ĉiuj landoj per telekso, telegrafado kaj telefono. La flughaveno Dayong, kiu malfermos linion al la pitoreskejo Zhangjiajie, estas en konstruado. Ĝi plenumiĝos fine de 1992.

Lia prezento pri la loko estis tre detala, ke mi havis nenion por demandi. Mi pensis nur, ke se mi ankoraŭfoje vizitos la lokon, mi vidos multajn ŝanĝiĝojn kaj multajn novaĵojn.

Danco kaj Opero Surstrate de Pekino

Teksto de CAO WEI

Fotoj de LING YOUJUAN kaj ZHANG XIAOPING

LA malnova Pekino estis griza kaj tiam la homaj koroj estis tristaj. Nun la helaj domegoj birdvidigas la tutan urbon kaj la homaj koroj pleniĝas de ĝojo. Nun la medio komplete ŝanĝiĝis kaj Pekino satoriĝas de vigleco.

Dimanĉe, promenante sur stratoj aŭ en parkoj, oni renkontas grupojn da ĝojaj homoj, kiuj aŭ dancas en rondoj, aŭ dancas diskoon, jangon, tradician dancon de nordokcidenta Ĉinio, aŭ kantas pekinan operon.

Por scii, kiel estiĝis tiu surstrata amuzado, mi venis en Yuyuantanparkon, Pekino, kaj intervjuis dancantan emeriton Maljuna Liu. Li diris al mi: "Fakte, tiu surstrata distrado devenis de gemaljunula diskoo. Kiu kuraĝis danci surstrate antaŭ kelkaj jaroj? Oni certe malaprobis tion. Eĉ la dancantaj maljunuloj mem hontis pri tio. Tamen, ni gemaljunuloj dancas por sano, pri kio neniu klaĉis. Kaj poste mi ekamis dancon kun pli densa gusto de arto." Certe, antaŭ kelkaj jaroj la ĉinoj, ĉiam ĝentilaj kaj neelmontrigemaj, ne aprobis tiujn amuzadojn. Sed pro tempopaso kaj ŝanĝiĝo de la medio oni ektoleris ilin.

Ĉe la parka enirejo kolektiĝis ĉ. mil dancamatoroj. Oni alportis magnetofonon el sia hejmo, metis biciklon ie proksime, demetis palton kaj ekdancis. Inter la dancantoj estis viglaj gejunuloj kaj grizharaj gemaljunuloj. Kvankam ili dancis en diversaj manieroj, tamen ili ĉiuj dancis kun granda ĝojo. Iu maljunulino mode vestita altiris

mian atenton. Ŝi gracie dancis jen rapide, jen malrapide. En la paŭzo mi interparolis kun tiu ĉi maljunulino kun maldika, sed vigla vizaĝo. Ŝi nomiĝas Zhao Zujun. 83-jara, ŝi havas gefilojn, genepojn kaj ankaŭ pranepojn. Ŝi ŝajne estas bonedukita, sed fakte nur ordinara dommastrino. Nur en la lastaj jaroj ŝi eklernis dancon. Komence ŝi dancis nur por sia sano, sed poste ekamis danci en rondoj kaj volas pli feliĉe vivi la vesperon de sia vivo.

Mi diris ĝis revido al Zhao kaj intervjuis paron da gejunuloj ĵus dancintaj. Komence mi opiniis, ke ili estas geedzoj, sed interparolinte, mi informiĝis, ke ili konatiĝis unu kun la alia nur antaŭ nelonge en dancejo. La viro nomiĝas Yang. Li, 38-jara elektronika teknikisto, jam havas infanon. Li kaj lia edzino ambaŭ ŝatas danci. Sed por prizorgi la infanon ili ne povis kune iri al dancejo. Mi demandis Yang: "Pro kio vi dancas?" Li respondis: "Unue mi volas min elmontri antaŭ la publiko. Mi ne estas filmstelulo, nek kantisto. Generale krom miaj familianoj kaj kolegoj neniu scias mian ekziston. Mi volas montri en la balo dimanĉe, ĉar mi dancas bele. Alie, mi volas ŝanĝi mian vivmedion, opiniante, ke mi devas havi ankaŭ sociajn interrilatojn. Ĝuste pro la sama ŝatokupo mi konatiĝis kun tiu ĉi sinjorino."

Aŭdinte liajn vortojn, mi dronis en meditado. Katenite de feŭdismaj etikaj principoj, plejparto de la ĉinoj ne kuraĝis kontakti kun alia sekso krom siaj familianoj,

alie oni klaĉis ilin postdorse. Hodiaŭ en nia lando la rutinaj konceptoj senbrue malaperas kaj oni pli kaj pli multigas sian kontakton en la socio.

Proksime de ili, grupo da gemaljunuloj dancis jangon. En kamparanaj vestoj de nordokcidenta Ĉinio kun ruĝa tuko en la mano, ili gaje turnadis sin, akompanate de orkestro konsistanta el ĉinaj kaj okcidentaj instrumentoj. Jen leviĝis altaj tonoj de surnao, jen sonis malaltaj tonoj de akordiono. Kiam mi fotis la maljunajn dancantojn, kelkaj el ili alparolis min. Ili plejparte estas emeritoj kaj pasigis sian junecon en Yan'an kaj liberigitaj regionoj de nordorienta Ĉinio, kie furoras jango. Tial oni povas diri, ke ili dancas jangon tre lerte.

"Oni diras, ke nun estas jaroj de diskoo, do kial vi dancas jangon?" mi demandis.

"Danci jangon estas pli komforte kaj pli bele ol danci diskoon ekzotan. Ni preferas nian propran tradicion!" ili konkure respondis.

Sur ilia vizaĝo mi legis ravitecon kaj sopiron al la juneco kaj deziron denove sperti la pasintan vivon.

Tiam aŭdiĝis en venteto muziko de *jinghu*-o (iu ĉina korda instrumento). Mi do turnis mian rigardon al aro da amantoj de la pekina opero, kiuj kantas nemalproksime. Ili estis kantantaj fragmenton de la pekina opero "Ruzo de Malplena Urbo", kiu rakontas militan vivon en la lastaj jaroj de la Dinastio

Orienta Han (25-220). Kiam la fragmento finiĝis, mi tuj rapidis intervjui ilin. Ili plejparte estas pekinanoj, naskiĝintaj en familioj amantaj la operon. Influite de la familio ankaŭ ili ekamis la operon, sed nuntempe la pekina opero ne tiel prosperas kiel antaŭe kaj oni malofte havas la ŝancon ĝin spekti en teatroj. Tial ili venis ĉi tien kaj kantis fragmentojn de la pekina opero por riĉigi sian kulturen vivon.

Forlasinte ilin, mi biciklis hejmen. Mi subkonscie turnis la adiaŭan rigardon al la homamaso kaj subite ekkomprenis, ke tio estas miniaturo de postlabora vivo de pekinanoj. ■



Orkestro por dancantoj

Maljunuloj dancas *jange-dancon*.





Komencantoj kaj veteranoj

87-jara maljunulino en dancado

Dancado en mateno



Hunan, loko konata, sed multe ŝanĝiginta (Daŭrigo)

de LU CHUANBIAO

DEVIZO DE KOMERCISTO

Mi trovis, ke multaj lokanoj ŝatas diri, ke Hunan-anoj scipovas militi, legi kaj prilabori teron, sed ne komerci. Kiam oni praktikis planizitan ekonomion, oni neglektis komercadon. La Hunan-anoj fieras pri siaj eruditoj famaj tra la lando kaj ŝatataj gvidantoj. Sed nun por kio servas la diro?

“Por mi ĝi ludas almenaŭ duoblan rolon. Kiam mi traktas kun komercisto, mi atentigas min per ĝi: Ne estu trompita de li. Kiam mi sukcesas, mi avertas min: Kun denaska manko, mi ne devas esti memkontenta, alie mi bankrotos.” Humure klarigis al mi s-ro Yuan Shaoqiu, estro de la Eksterkomerca Komisiono de Xiangtan. Li ne estis komercisto, tamen sufiĉe sperta en sia profesio.

Meze de la 50-aj jaroj funkciis en Hunan nur unu buroo de ekstera komerco, kun malmulte da laborantoj. En 1984 fondiĝis eksteraj komercaj komisionoj de la niveloj de provinco, subprovinco kaj urbo. Tiam en la provinco estis pli ol 100 entreprenoj havantaj la rajton fari importadon kaj eksportadon, kaj 25 000 personoj okupiĝis pri ekstera komerco. Inter ili ne mankis fakuloj. Mi informiĝis, ke foje membro de la Hunan-a delegacio traktis kun alilanda komercisto en la Kantona Foiro de Ĉinaj Eksportaĵoj. La komercisto postulis, ke lia fabriko produktu por li 60 000 dekduojn da viraj ĉemizoj en 20 tagoj. La mendo estis super la povo de la fabriko. Sed fine la fabriko solvis la problemon kunlabore kun aliaj du fabrikoj en la

provinco. La tasko estis akurate plenumita kaj la mendinto multe dankis lin.


La ekstera komerco de Hunan disvolviĝis de nulo, venkante diversajn malfacilaĵojn. Nun ĝi tenas komercan kaj ekonomian rilaton kun 110 landoj kaj regionoj. De 1979 ĝis 1989 la totala valoro de eksportaĵoj kaj importaĵoj de la provinco atingis 5.964 miliardojn da usonaj dolaroj, 4.78-oble pli multe ol tiu de la 28 jaroj antaŭ 1979. La valoro de eksportaĵoj de 1989 estis sesoble pli granda ol tiu de importaĵoj. En 1951 varoj de Hunan trovis merkaton nur en Hongkong, Aomen kaj Sovetunio, kaj nun ili vendiĝas en Hongkong, Aomen, Japanio, Usono, Sudorienta Azio, Eŭropo, Latin-Ameriko, Mez-oriento kaj Afriko. Kaj unuajn lokojn okupas la kvantoj de la eksportitaj volframa erco, antimonaĵo, malmola aloj, porkoj, kana-


bo kaj ĝia teksaĵo, ceramikaĵo kaj krakfajraĵo.

Nun Hunan-provinco rapidigas siajn paŝojn en utiligo de alilanda kapitalo, enkonduko kaj eksporto de teknikoj. De 1979 ĝis 1989 en ĝi 673 projektoj estis investitaj per alilanda kapitalo en la sumo de 936 milionoj da usonaj dolaroj. El la 158 entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj plejparto akiras kontentigan profiton.

Kompreneble, la nombroj ne estas grandaj, kompare kun tiuj de antaŭirantaj provincoj kaj urboj, ĉar la industrio de Hunan havas malfortan bazon kaj ĝia disvolviĝo komenciĝis malpli frue. S-ro Chen, la singapura ĝenerala direktoro de la Xiangpeng-a Limigita Kompanio de Fajna Kemi-industrio de Xiangtan, diris al mi: “Hunan estas multe naturdotita. Kiam komercistoj de aliaj landoj bone scios

La Ĉina-Japana Vestofabriko Xiangquan





Pejzaĝo de
Tianzi-monto

ĝin, ili svarmos tien ĉi." Li decidis fari investon en Ĉinio ĝuste post esploro en kelkaj landoj de Sudorienta Azio.

Nun la kompanio glate disvolviĝas. Ĝiaj produktaĵoj vendiĝas ne nur en grandaj prestinkturejoj de Pekino, Ŝanhajo kaj la provinco, sed ankaŭ en Usono, Japanio, Italio, Hispanio kaj Tajlando. Mi gratulis lin pro la sukceso kaj li diris, ke li multe suferis. Li klarigis, ke li sentis grandan solecon. Kaj cetere, iuj laboristoj komence ne povis kutimiĝi al lia severa postulo en tekniko kaj disciplino kaj plendis kontraŭ li, ke li "iru hejmen".

"Ĉu vi iam havis la ideon foriri?"

"Tion mi neniam pensis. Mi kredis, ke mia elekto estas ĝusta. Mi kredis la politikon de la ĉina registaro. Preskaŭ ĉiuj krudmaterialoj bezonataj de mia fabriko estas akireblaj ĉi tie. Kaj krome, la pago por laboristoj estas malalta, la cirkonstancoj de merkato kaj trafiko estas kontentigaj. La fakto pruvas, ke la laboristoj kompetentas en sia laboro kaj ni bone kunlaboras."

POR SIN ELTURNI EL MALRIĈECO

Hunan kun areo de 210 000 kvadrataj kilometroj disvolviĝas malekvilibre en siaj diversaj lokoj pro diversaj kaŭzoj. Antaŭe ĉirklis la diro, ke en la mezo de Hunan multas fabrikoj, en la sudo neferaj metaloj, en la nordo greno, dum en la okcidento nenio. La okcidenta parto de la provinco estas izolita montregiono kun malmulte da agroj. Primitivaj terkulturaj metodoj kaj malfacile rezisteblaj natu-

raj katastrofoj faris rikoltojn malbonaj, ke la loĝantoj vivis tre mizeran vivon. La mizera historio restas neŝangebla, tamen por feliĉigi siajn posteulojn, la montanoj neniel volis toleri pluan ekziston de la stato. Min kortuŝis la konstruado de la Jingzhou-a Dong- kaj Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Huaihua-subprovinco.

Iutage, forstokulturistoj Lin Yue kaj Yin Songbai akompanis min en pririgardo de la forstaro ĉirkaŭ la guberniurbo. Lin Yue diris al mi, ke en la 2 466-hektara loko kun la guberniurbo kiel la centro oni plantis arbidojn jaron post jaro. Pro nezorgema administrado neniam aperis tie forstaro, kaj la popolo jam perdis la intereson pri forstumado. Subtenate de la gubernia registaro, en kvin jaroj ili kaj lokanoj arbarizis 2 266 hektarojn per abioj kaj 200 hektarojn per mandarinujoj. Vidinte la ekzemplon, kamparanoj starigis fruktoĝardenojn ĉe siaj vilaĝoj, kaj la dezertaj montoj ĉirkaŭ la guberniurbo estis verdigitaj. Rigardante foren de sur montpinto, mi vidis, ke ĉiuj partoj de la loko verde vestiĝis. En la gubernio estas 7-8 tiaj verdejoj.

"En 1988 Huaihua-subprovinco estis difinita kiel eksperimenta regiono de reformado, por kiel eble plej rapide ekspluati la montregionon kaj disvolvi poreksportan ekonomion," diris k-do Liu, estro de la administra oficejo de la subprovinco. Tie la vastega sovaĝa montaro estos bonaj kampoj, la abundo da akvo servos kiel mal-kara energio kaj neagrikultura produktado prezentos vastan perspektivon. Tamen la loko havas siajn

mankojn. Ekz-e, la ekonomia bazo estas malforta, la vara produktado disvolviĝas malrapide, la kvanto de prilaboritaj mandarinoj, teo kaj drogherboj estas tre malgranda kaj oni vendas ĉefe krudajn erojn kaj duonprilaboritajn minojn. Por ŝanĝi la staton oni penas fari la lokon la plej granda bazo de ligno, fruktoj kaj brutoj de la provinco, utiligi akvoenergion kaj konstrui la plej grandan elektran bazon de la provinco. Krom farado de papero, rabotajotabuloj, fibrotabuloj kaj krucoplakaĵoj, disvolviĝas ankaŭ produktado de konstrumaterialoj, kemiaĵoj, ceramikaĵoj, medicinaĵoj, manĝaĵoj kaj vitraĵoj.

Samtempe kun tio, la subprovinco intensigas ekonomian kunlaboron kun najbaraj regionoj, kolektas por si kapitalon kaj funkciigas pli ol 40 foirojn de ligno, mandarinoj, drogherboj, brutoproduktaĵoj kaj aliaj. La politiko de reformado kaj pordomalfermo multe helpis al la loko importi kapitalon. Ĝis 1989 la monsumo pruntita de la Monda Banko por konstrui fruktobazon atingis 25.75 milionojn da juanoj. Lastatempe la banko pruntis al la loko 27.5 milionojn da juanoj por forstumado. Por plenumi la bezonon de la en-kaj eksterlanda merkato oni starigis bazon de bambuŝoso kaj aliaj lokaj produktaĵoj. 206 entreprenoj produktas eksportaĵojn de 7 000 specoj. La valoro de la lokaj produktaĵoj eksportitaj de la subprovinco en 1988 kaj 1989 estis 61.64 milionoj da usonaj dolaroj.

La eksperimentejo malfermos novan vojon sekvatan de la tuta provinco. La sperto tiuflanka estas disvastigita en la provinco.

MIA FELIĈO

Antaŭ la finiĝo de mia vojaĝo mi renkontiĝis en Changsha kun la indiĝeno de Hunan. Li demandis, ĉu mi alkitimiĝas al la malseka klimato kaj pikaj pladoj de Hunan, kaj kion fremdan por mi ankoraŭ havas la provinco.

(Daŭrigo sur p. 30)

Transformatora Fabriko de Shenyang


La fabriko estas la plej granda el la samspecaj fabrikoj de Ĉinio, kun avangardaj ekipaĵoj kaj teknologio. Ĝia trifaza aŭtotransformatoro kun 360 MVA kaj 500 KV bone funkcias en la plej granda ĉina hidroelektrajo Gezhouba sur Yangzi-rivero.

La ĉefaj produktaĵoj de la fabriko estas transformatoroj, interinduktoroj kaj reaktoroj, kun 300 specoj en 35 serioj, ĉiuj faritaj laŭ normo de la Internacia Elektroteknika Komisiono. Iliaj produktokvantoj konsistigas pli ol 50% de la totala produktokvanto de Ĉinio. La produktaĵoj de la fabriko vendiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en 32 landoj kaj regionoj. Ĝia teknologio jam eniris en la internacian merkaton.

La fabriko volonte servos al klientoj de ĉiuj landoj.
Mendu ĉe: Transformatora Fabriko de Shenyang



**Adreso: N-ro 8, Erduan,
Beierlu-str., Tiexi-distrikto,
Shenyang, Ĉinio**
Telefono: 457431 453207
Telegramo: 5581

En la muntejo de transformatoroj



Seka reguliga transformatoro SG2-1600/10TH

La trifaza aŭtotransformatoro kun 360 MVA kaj 500KV funkcianta en la hidroelektrajo Gezhouba sur Yangzi-rivero



Kuraĝiga filozofio

de HOU JUELIANG

KIAM mi estis lernanto, mi legis la artikolon «Lernigo» de filozofo Xunzi. Ĝi priskribas multe da teorioj pri lernado, kiuj estas utilaj por la homoj en la tuta vivo. Mi ege miris, ke en la artikolo troviĝas neniu abstrakta komentario, ĉiuj vortoj ĉarmas, ĉie legiĝas tropoj. En la artikolo Xunzi eksplikis teorion per tropoj, same kiel poeto esprimas sian senton per figuroj. De tiám pasis 30 jaroj, tamen ĝi restas por mi freŝa.

Xunzi opiniis, ke lernantoj lernas multe da scioj de instruistoj, kaj kresko de la lernantoj ne disigblas de la gvido de instruistoj, tamen ili povas superi siajn instruistojn. Li traktis pri tiu teorio ne per malplena parolo, sed per du trafaj filozofiaj tropoj. Li diris, ke indigo estas ekstraktita el indigoplanto, sed pli malhela ol indigoplanto; glacio estas solidiĝinta el akvo, sed pli malvarma ol akvo. Ĉi tie indigoplanto kaj akvo figuris instruistojn, kaj la indigo kaj glacio — lernantojn. Surbaze de tio ankaŭ lernantoj povas superi siajn instruistojn. La du tropoj uzitaj de Xunzi estas elvokivaj kaj interesaj, kaj implicas la filozofian vidpunkton, ke “la novicoj superas la veteranojn”, por kuraĝigi lernantojn, ke ili superu siajn instruistojn, juna generacio superu la maljunan. La artikolo «Lernigo» kaj aliaj verkoj de Xunzi inspiras min fari ion novan. Oni povas diri, ke lia filozofio estas kuraĝiga.

Xunzi naskiĝis proksimume en 313 a.K. kaj mortis en 238 a.K.

En sia juneco Xunzi lernis en Qi-regno kaj kontaktiĝis kun pluraj skolaj instruistoj. Pro sia vasta vidkampo li estis granda talentulo. Li trifoje ŝtatoficiĝis kaj fine forlasis Qi-regnon pro kalumnio kaj funkciis kiel oficisto en Ĉu-regno. Li dediĉis siajn lastajn jarojn al instruado kaj verkado. Lia filozofio estas sistema kaj enhavoriĉa. Surbaze de konfuceanismo, li lernis doktrinojn de la legalizista skolo, logikista skolo, taoismo kaj mozismo. Li epitomigis la pensojn de la antaŭaj filozofoj. Multaj el liaj verkoj perdiĝis. Nun legeblas nur 32 artikoloj, kiujn posteuloj kolektis en la libron «Xunzio».

En la libro «Xunzi» la artikolo

«Pri la Ĉielo» estas vaste konata. Ĝi estis majstra verko de Xunzi kaj ankaŭ standardo de lia materiisma filozofio. La filozofoj, aperintaj en la superŝticha tempo, neeviteble parolis pri fantomoj kaj dioj, rigardante la naturan ĉielon kiel personigitan dion kaj subtakante la rolon de la homoj. Sed en traktado pri la rilatoj inter la ĉielo kaj homoj ili ĉiam opiniis la homojn sklavoj de la ĉielo, ke la homoj estimu kaj timu la ĉielon. Sed Xunzi venis al tute alia konkludo. En sia artikolo «Pri la Ĉielo» li science eksplikis tiajn rilatojn. Li emfazis, ke oni devas distingi inter la ĉielo kaj la homoj, inter la naturaj fenomenoj kaj sociaj aferoj. Tiam oni rigar-



dis la kosmon mistera, ne konis la leĝojn de la naturo, tial ili sentis teruron pro iuj "eksterordinaraj ĉielaj fenomenoj", eĉ pro aerolito neklarigebla tiam. Tamen Xunzi agis male. Li faris atentan esplorado pri tiuj fenomenoj kaj klarigon per sia propra teorio, dirante, ke ili estas nur metamorfozoj de la naturo kaj ne montras fatalon aŭ fortunon.

La artikolo «Pri la Ĉielo» kongigas al la homoj, ke la rotacio de la suno, luno kaj steloj, alterno de la sezonoj kaj kresko de la estaĵoj tute ne dependas de la "ĉielo" kaj nek de la homa volo. Nek la ĉielo nek la homoj povas regi la objektivajn leĝojn de la naturo. Same, la homaj feliĉo kaj malfeliĉo, fatalo kaj fortuna ne dependas de la ĉielo, sed rezultas el la evoluo de la homa socio. Por la homoj la ĉielo ne estas timinda, sed venkebla. Jen lia filozofio pri venko super la ĉielo.

En sia artikolo «Pri la Ĉielo» Xunzi eksplikis: Anstataŭ kulti kaj adori la ĉielon, estas pli bone ĝin bridi kiel beston kaj superregi; anstataŭ obei kaj prikanti la ĉielon, estas pli bone mastri ĝiajn leĝojn kaj utiligi ĝin; anstataŭ atendi senfare bonan veteron, estas pli bone utiligi diversajn veterojn laŭ kondiĉoj; anstataŭ lasi plantojn libere kreski, estas pli bone plibonigi iliajn speciojn pere de la homa intelekto; anstataŭ sole studi pri la leĝoj de la kresko de ĉiuj estaĵoj, estas pli bone utiligi tiujn leĝojn por favorigi ilian kreskadon.

Tiuj vortoj montris, ke koncerne la rilatojn inter la ĉielo kaj la homoj, Xunzi alte taksis la rolon de la homoj, insistante, ke oni devas vidi la forton kaj potencon de la homoj, plene disvolvi ilian subjektivan iniciativon, koni kaj uzi la objektivajn leĝojn por venki la ĉielon. Li opiniis, ke la sola atendo de la ĉiela favoro ne estas espero de ĉiuj estaĵoj al la homoj.

Iuj antikvaj ĉinaj filozofoj tre interesiĝis pri la homa naturo kaj

senĉese diskutis pri ĝi. Heredanto de konfuceanismo Menzio opiniis, ke la homa naturo estas bona, ĉiu estas simpatia. Li diris: Kiu ne volas etendi sian manon por savi la infanon falintan en puton? Laŭ Menzio homoj denaske estas bonfaremaj. Certe, en la mondo ankaŭ estas aĉuloj, tamen tio estas kaŭzita de la medioj.

La teorio de Xunzi kaj tiu de Menzio draste kontraŭstaris unu al la alia. Xunzi opiniis, ke la homa naturo estas malbonfaremo. Homoj havas diversajn dezirojn: Malsatulo deziras santon, frostiganto varmon, lacigita homo ripozon, okuloj belan koloron, oreloj belan sonon, buŝo bonan guston, koro profiton kaj korpo komforton. La ekzisto de tiuj deziroj estas timinda kaj netolerebla. Oni devas reguligi sian konduton per "etiketo kaj principo", transformi la malbonan naturon de la homoj, fari bonon kaj reteni sian individuan avidon kaj amike vivi inter si. Alie, se la homa naturo libere disvolviĝus, ĉiuj batalus por ĉasi profiton, kaj socia tumulto okazus. La malbona naturo de homoj estas timinda, ĝi similas diluvon kaj rabobeston, tamen ĝi estas jungebla kaj transformebla. Ĉiu homo povas fariĝi nobla sanktulo. Filozofio de Xunzi ne estas pesimisma. Li verkis la artikolon «Pri la Ĉielo» por kuraĝigi la homojn batali kontraŭ la naturo, kaj superregi la mondon. Li oponis kontraŭ la teorio pri natura bonfaremo kaj pledis por tiu pri natura malbonfaremo, atentigante homojn koni siajn proprajn mankojn, pene perfektigante sin por fariĝi bonuloj nedamaĝantaj aliajn kaj la socion, kaj tiel nature pliboniĝas la homaj interrilatoj.

Alte taksi la subjektivan iniciativon de la homoj, dediĉi grandan atenton al la edifado de la homoj kaj transformado de la socio estas naturo de la filozofio de Xunzi. Li opiniis, ke lernado finiĝas per ago. Li estis filozofo, kiu

alte taksis "agadon". Li abomenis malplenan babilon, oponis al kontraŭeco inter la ago kaj parolo. Li diris: "Kiu kapablas kaj paroli kaj agi, tiu estas ŝtata trezoro; kiu kapablas ne paroli sed agi, tiu estas talentulo; kiu kapablas paroli, sed ne agi, tiu estas utilulo; kiu bele parolas sed fiagas, tiu estas ŝtata monstro. Reganto de la ŝtato devas respekti la trezoron, ami talentulon, enoficigi utilulon kaj elimini monstرون." Xunzi, taksante homon laŭ la vidpunkto de scio kaj ago en unuigo, saĝe dividis la homojn en kvar kategoriojn. Lia parolo ne elmodiĝis, en ĉiu historia periodo de la lando troviĝas "ŝtataj trezoroj" kaj "ŝtataj monstroj".

Xunzi meritis la titolon de "ŝtata trezoro" siatempe. En sia tuta vivo li fruktodone aktivadis. Li prelegis, argumentis pri milito kaj politiko. Li estis meritoplena filozofo, edukisto kaj politikisto. Li malaprobis "senageco", la negativan vivkoncepton de taoismo kaj pledis por la vivkoncepto de energia strebado de konfuceanismo. En sia verko li rakontis tre pensigan fablon:

Zigong diris al sia instruisto Konfuceo: "Legado kaj lernado tedas min. Mi volas servi ĉe la regnestro por ripozo."

Konfuceo respondis kun rideto: "Servante ĉe la suvereno vi devas lin akompani de mateno ĝis vespero, zorgante kaj singardeme. Kiel vi povos ripozi tie?"

"Mi do iru al la gepatroj por esti bona filo. Ĉu mi ne havus ripozon tie?"

"Ne. Estante bona filo, vi devas fari multon. Kiel do vi povus havi ripozon?"

"Nu, mi revenu al mia edzino por ripozi."

"Ankaŭ neeble. La edzo devas fari sin ekzemplo por la edzino. Kiel vi povus ripozi?"

"Mi do ripozu ĉe amiko. Ĉu ankaŭ tie ne?"

"La amikeco celas reciprokan

Sako da arĝentaj moneroj

Iun tagon, malriĉulo iris sur monton por haki brullignon. Survoje li trovis sakon. Malferminte ĝin, li vidis dekojn da arĝentaj moneroj ene. La malriĉulo tre ĝojis, ke kontraŭ la mono li povos aĉeti multe da greno por siaj malsataj infanoj. "Sed la perdinto estas en granda maltrankvilo," pensis en si la malriĉulo. Li kaŝis la sakon kaj daŭrigis la iradon.

En la sekvanta tago li aŭdis, ke la perdinto estas fama riĉulo. Kutime, la trovinto devas ricevi dekonon de la trovaĵo kiel rekompenco.

La bonkora malriĉulo venis al la riĉulo kaj redonis al li la sakon kun arĝentaj moneroj, dirante: "Jen viaj moneroj."

La riĉulo transprenis la sakon, foje refoje nombris la monerojn kaj diris al la malriĉulo: "Ho mia bonulo, la sako estas mia, sed malmultiĝis la moneroj en ĝi. Mi havis 80 monerojn en la sako, sed nun restas nur 60. Sendube, vi



ŝtelis la 20 monerojn. Nun vi ŝuldas al mi 12 monerojn, se mi dekalkulas la 8, kiujn mi devas doni al vi kiel rekompenco. Redonu al mi 12 monerojn, alie mi akuzos vin."

La malriĉulo terurigiĝis. Kion fari? Li devis iri al juĝejo

kune kun la riĉulo. La juĝisto, justama kaj honesta, ĝuis grandan respekton de la popolo.

"Via juĝista moŝto, mi iris sur monton por haki brullignon kaj trovis survoje la sakon. Mi kaŝis ĝin kaj eĉ unu moneron ne prenis el ĝi."

"Via sinjora moŝto, li mensogas. Mi havis 80 monerojn en la sako, sed nun restas nur 60. Se ne li, kiu do povis preni el la sako la 20 monerojn?" diris la riĉulo.

La juĝisto demandis la malriĉulon: "Ĉu vi ne pensis, ke kun la monsumo vi povos vivi bone?"

"Jes, mi pensis. Mi vivtenas mian edzinon kaj ses infanojn sole per vendado de brulligno. Kontraŭ tiuj moneroj mi povos aĉeti oleon, rizon, fiŝon kaj viandon. Sed mi pensis ankaŭ, ke mi ne devas uzi la monon, ĉar ĝi ne estas mia."

La juĝisto turnis sin al la riĉulo: "Ĉu vi povas certigi, ke en via sako estis 80 arĝentaj moneroj?"

"Jes, sendube, 80!" respondis la riĉulo.

"Kvankam vi ambaŭ ne povas doni konvinkan ateston," diris la juĝisto kun rideto, "tamen estas facile fari juĝon."

"Vi, respektinda sinjoro, ĝuas altan famon en la socio, kaj mi neniel kredas, ke vi mensogas. Mi kredas, ke en via sako estis 80 arĝentaj moneroj."

"Jes, jes, prave. Kiel saĝa vi estas," flate diris la riĉulo.

"Kaj vi, kompatinda malriĉulo, mi neniel dubas pri via diro. Vi povus proprigi al vi la tutan sumon da mono, sed kial vi prenis nur 20? Estas klare, ke vi ambaŭ diris la veron. La fakto estas nur, ke tiu sako kun 60 moneroj, kiun vi trovis, ne estas la sako, kiun tiu ĉi sinjoro perdis."

La juĝisto donis la sakon al la malriĉulo, dirante al li: "Portu ĝin hejmen kaj redonu ĝin al vera perdinto. Se poste vi trovos sakon kun 80 arĝentaj moneroj, redonu la sakon al tiu ĉi honesta sinjoro." Tion dirinte, la juĝisto turnis sin al la riĉulo: "Ĉu mia juĝo estas justa?"

La riĉulo mutiĝis kiel ŝtono. ■

helpon kaj ankaŭ necesas fari multon. Kiel vi povus ripozi tie?"

"Eble mi havus ripozon, se mi estus simpla kamparano."

"Erare vi pensas. Vi devas falĉi herbojn tage, prepari pajloŝnurojn vespere, mem konstrui domon, fari plugadon kaj semadon. Ĉu vi povus ripozi?"


"Zigong senhelpe demandis: "Laŭ vi, mi do neniel trovas ripozon?"

Konfuceo respondis humure: "Ja ekzistas ripozejo por vi! Jen alta, rondeta tombo, kvazaŭ renversita vazo!"

Zigong ekkonsciis, dirante: "Ho, nur post morto mi havos ripozon!"

Ankaŭ la fabla rakonto tuŝis mian koron. Ĉiufoje, kiam mi laciĝis de laboro kaj emis ripozi, tiu ĉi rakonto reardigis al mi la koron. ■

La solvo por "Ludo"



EKONOMIO

- Daqing-olekampo en nordorienta Ĉinio produktis ĉiujare 50 milionojn da tunoj da oleo en 15 sinsekvaj jaroj. Nun ĝi penas teni la rekordon ĝis la jaro 2000. Daqing-olekampo sukcesis pro tio, ke ĝi alprenis ĝustan principon en la komenca periodo de la ekspluatado kaj senĉese renovigis siajn teknikajn ekipaĵojn.

- En la komenco de la 50-aj jaroj estis nur du fiksjaj pontoj super la Flava Rivero. Nun super ĝi funkcias sume 75 pontoj de 14 specoj, kiaj ŝtona arkponto, kabla pendponto kaj antaŭstreĉita ponto. Tri pontoj estas en konstruado. La Flava Rivero jam fariĝis rivero kun plej multaj pontoj en Ĉinio.

- Vizaĝe al industria poluciado, uzado de kemiaĵo por produkti multajn manĝaĵ-materialojn kaj malpura prilaborado de manĝaĵoj, la Agrikultura Ministerio de Ĉinio ellaboris planon de verdamanĝaĵa produktado kaj prenas ĝin kiel ĉefan industrion en 1991-1995.

Por tio la ministerio havas la celon, ke en la fino de la kuranta jarcento viando, ovoĵo, lakto kaj kortbirdaĵoj liveritaj al grandaj kaj mezgrandaj urboj plejparte atingu la normojn de "verdaj manĝaĵoj", kaj ankaŭ la agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj bonkvalitaj fruktoj, laktopulvoro, vino kaj trinkaĵoj liveritaj de la eksportaĵa bazo plejparte atingu la normojn.

- Nun la elektro konsumita en la ĉina kamparo atingis 200 miliardojn da kilovatthoroj, 10 000-oble pli multe ol tiu en 1949. Nun uzas elektron en Ĉinio 700 milionoj da kamparanoj en 80% de la kamparanaj familioj, 85% de la vilaĝoj kaj 95% de la distriktoj de Ĉinio.

- Jam unuapaŝe solviĝis la problemo de nesufiĉeco da fiŝoj en la grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio. Ĝi ĝenis Ĉinion dum multaj jaroj. De 1985 la totala produktokvanto de fiŝoj kreskas ĉiujare almenaŭ je 11.2%, kaj ĝi superis 12 milionojn da tunoj en 1990, kaj per tio Ĉinio fariĝis la tria lando en la mondo, kies kvanto de akvoproduktaĵoj superis 10 milionojn da tunoj.

La dolĉakvaj kaj marakvaj produktaĵoj de Ĉinio konsistigas pli ol 50% de la totala kvanto de akvoproduktaĵoj.

- En la pasintaj dek jaroj Ĉinio kaj la Monda Banko faris fruktodonan kunlaboron. Ĝis nun, estas subskribitaj sume 87 kreditaj kontraktoj. La totala kredit-sumo estas 9.6 miliardoj da usonaj dolaroj.

Oficistoj de la Monda Banko opinias, ke la kredito de Ĉinio, ĝenerale plenumiĝis bone, i.a. la agrikulturaj kreditaj kontraktoj plej bone plenumiĝis. Ili ludas sian rolon en la konstruado de agrara sistemo kaj urbeta entreprenna sistemo.

SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

- La ĉinaj sciencistoj akiris rimarkindan sukceson en baza scienco, alttekniko kaj praktika tekniko en la pasintaj dek jaroj. Nun parto de la projektoj, gajnintaj premion de scienc-teknika progreso en 1990, donis profiton de 30 miliardoj da juanoj. Iuj fruktoj, kiel la pekina elektron-pozitona koliziilo kaj laser-eksperimenta aparato n-ro 12, ĝuis renomon en la mondo.

- En 1986-1990 Ĉinio finkonstruis sintezan esplorsistemon de la atmosfero, plurgradan meteokomunikan sistemon, prilaboran sistemon pri aŭtomata traktado de meteomaterialoj, prognozan kaj avertan sistemon kaj meteoservan sistemon. Ĉinio starigis modernan meteoservan sistemon, havas sian propran meteosateliton kaj praktikas administradon regatan per komputilo. Atmosfera aktivado ne konas landlimon. Ĉinio pluapaŝe plifortigos kunlaboron kaj interŝanĝon inter si kaj la Monda Meteorologia Organizo kaj diverslandaj meteofakoj.

- La unua aëroesplora raketo de Ĉinio «Teksistino 3» estas sukcese lanĉita en la aëroesplora lanĉejo de Hainan sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. La raketo, kun longo de 4.87 m, diametro de 0.25 m, pezo de 285 kg kaj efika ŝarĝo de 45 kg, povas fari sciencan esploron en aero alta malpli ol 120 km, kaj estas nemankigebla instrumento por esplori la jonosferon kaj atmosferon. La de ĝi akiritaj datenoj povas helpi provfari transportan raketon, artefaritan sateliton, homoportan kosmonaveton k.a. kaj doni servon al radiokomunikado.

La nomita lanĉejo estas unu el la kelkaj malaltlatitudaj lanĉejoj de aëroesplora raketo en la mondo. Koncernaj fakuloj de Ĉinio faros tie sciencan eksperimenton kune kun la alilandaj.



Riĉa rikolto de fiŝoj breditaj en dolĉa akvo

KULTURO


● En la Orienta Han-dinastio (25-220) Pattra-fovia bildo de Budho enkondukigis de Hindio en Ĉinion. Bedaŭrinde, ĝi perdiĝis kun la paso de tempo. Post multjara esplorado Sun Wenguang, vicestro de la Kultura Domo de Zihong-gubernio, Sichuan-provinco, per tradicia ĉina metiarta tekniko desegnis sur arbofolio freŝkoloran bildon kun vivecaj homfiguroj, similan al la Pattra-fovia bildo de Budho. Nun en la Brita Muzeo de Londono konserviĝas du tiaj bildoj.

● Juna ĉina kaligrafo Zhao Xin kopiis la faman antikvan literaturan verkon «La Tri Regno» en la daŭro de 10 jaroj. Por fari la kopion li uzis 1 505 pecojn de *xuan*-papero kun totala longo de 2 007 m. Tial ĝi estas kaligrafia verko kun la plej granda longo en la mondo.


● Vaste konataj buteraj artaĵoj de Tar-templo de Qinghai-provinco antaŭ nelonge estis eksponataj en Pekino.

La butera artaĵo estas farita el blanka butero kaj diverskoloraj mineralaj farboj. Oni faras diversspecajn buterajn artaĵojn, kiaj monteto, rivero, homfiguro, floro, birdo, insekto kaj fiŝo. Ekz., la eksponata verko «Princino Wencheng vojaĝanta en Tibeton» konsistas el pli ol 200 homfiguroj, diverspezaj kaj kolorriĉaj, kaj plene montras la altan teknikon de la artistoj de Tar-templo.

● Post la ekpraktiko de la reforma kaj pordomalferma politiko rapide disvolviĝas kunlabora eldonado kaj aŭtorrajta komercado de Ĉinio kun aliaj landoj. Laŭ statistiko, ĝis nun pli ol 100 eldonejoj de Ĉinio subskribis ĉ. 1 000 kontraktojn kun 200 alilandaj eldonaj kompanioj. Estas 2 000 specoj de eldonitaj kaj eldonotaj libroj, tiel ke pli multe da ĉinaj libroj vendiĝas en la internacia libromarkato.



La plej longaj ĉinaj ole- kaj gasduktoj metataj sur marfundon



Muntado de la raketo "Teksistino 3"

● Surroka bildo pri tribo de la primitiva socio estis trovita lastatempe en Gobio okcidente de la Interna Mongolio. Fakuloj konstatis post ekspertizo, ke ĝi estas surroka bildo pri tribo unuafoje trovita en Ĉinio kaj rigardata kiel kuriozaĵo.

Sur la bildo gravuriĝas 18 pintaj tendoj. La plej granda en la mezo estas loĝejo de tribestro aŭ kunvenejo de tribo. Inter la tendoj grandaj kaj malgrandaj staras multaj vivoveraj figuroj de homoj kaj ĉevaloj.

MEDIKAMENTOJ KAJ HIGIENO

● La Unua Kultura Foiro de Ĉina Medicino kaj Ĝiaj Medikamentoj okazis en Pekino antaŭ nelonge.

En la foiro estis multaj tradiciaj medikamentoj de la ĉina medicino kun historio de 5 000 jaroj. En ĝi veteranaj ĉin-medicinaj kuracistoj kuracis pacientojn kaj oni eksponis tradiciajn ĉinajn medikamentojn, kiel ginsengo, juna cervokorno kaj azenfela gelateno. Krome, en ĝi oni montris ankaŭ modernan akupunkturaron kaj aŭtomatan dekoktilon.

● Ureenzima provilo, kiu faras definitivan diagnozon pri stomaka malsano en unu minuto, estas elfarita de la Shenzhen-a Ailiguo-a Medicina Disvolva Limigita Kompanio de Shekou, Ĉinio.

Kronika aktiva stomakito kaj digesta ulcero estas kaŭzigitaj ĉefe pro infektiĝo de piloro-spiriloj. Eŝike kaj rapide diagnozi la infektiĝon de piloro-spiriloj estas premiso por ekzakte fari diagnozon. La ureenzima provilo estas uzata speciale por ekzameni piloro-spirilojn. Ĝi ekzamenas rapide kaj ekzakte, kaj donas rezulton meznombro en 37 sekundoj. La procento de ekzakte ekzamenitaj kazoj atingis 95.

Por sano de la kamparanoj

de SUN GUOLIANG

LAŭ materialo pri sanstato de la ĉinoj farita de ĉina medicina departemento, post kiam fondiĝis la popola respubliko en 1949, en Ĉinio la ĝenerala mortokvanto reduktiĝis de 2% en 1949 al 0.66% en 1988, dum la mortokvanto de infanoj de 13.9% en 1954 al 2.36% en 1988, la meznombra vivlongeco pliiĝis de 35 al 68.9 jaroj (viroj vivas 67 jarojn kaj virinoj 71 jarojn). La morbokvanto de infektaj malsanoj rimarkinde malaltiĝis. En Ĉinio 80 procentoj de la loĝantoj vivas en kamparo, tial la materialo klare montras la plibonigon de la sanstato de la ĉinaj kamparanoj. Dum la pasintaj 40 jaroj la nova Ĉinio faris grandan penadon por disvolvi la medicin-higienan aferon en la kamparo kaj protekti la sanon de la kamparanoj, mobilizante interalie la fortojn sociajn kaj popolamasajn. Ĉinio jam elkulturis milionojn da vilaĝaj kuracistoj kaj fondis kurac-sanitaran reton trinivelan: gubernian, distriktan kaj vilaĝan. Oni fondis ankaŭ kurac-sanitaran fonduson surbaze ĉefe de la kolektiva ekonomio kaj la kurac-sanitaran sistemon en pluraj formoj, kiuj nun estas en prova kaj esplora stadio.

PROSPERO KAJ MALPROSPERO DE KURACA KOOPERATIVO

En la kvardekaj jaroj de la du-deka jarcento oni praktikis en la liberigita Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Limregiono gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kooperan kurac-sistemon — medicina kooperativo. Dank' al praktiko de tiu sistemo la kamparanoj

ricevis kuracan servon per malmulta elspezo. En 1955 Zhaoyuan-gubernio, Shandong-provinco, daŭre praktikis la sistemon. La gubernio havis 158 medicinajn kooperativojn. Tio povis esti rigardata kiel burĝono de la sanprotektasistemo en la ĉina kamparo.

En la kvindekaj jaroj dank' al disvolviĝo de la agrikultura kooperigo la provincoj Shanxi kaj Henan praktikis kolektivan sanprotektan kurac-sistemon, t.e. kuraca elspezo estas pagata parte de la pacientoj mem kaj parte de la kolektivo. En septembro, 1956, la agrikultura kooperativo "Unueco" de Zhengyang-gubernio, Henan-provinco, iniciatis kooperan kurac-sistemon. Poste multe da popolaj komunumoj en la provincoj Hubei, Hebei, Hunan kaj Guizhou praktikis tiun sistemon. Tia kolektiva sanprotektasistemo estis praktikata surbaze de privata elspezo kaj subvencio de la komunumo, t.e. la kamparanoj ĉiujare pagis sanprotektan kotizon (tre malgranda sumo). Poste, kiam ili vizitis kuraciston, ili pagis nur malmulte da mono por medikamentoj kaj ambulatoria servo, kaj la ceteran parton pagis la komunumo kaj brigado per fonduso de komuna utilo. En 1960 Ĉinio eniris en la periodon de ekonomia malfacilo. Pro la peza ŝarĝo al la kolektiva ekonomio tiu sistemo malprosperiĝis portempe kaj reprosperiĝis post tri-jara reguligo de la nacia ekonomio. En 1968 tiu koopera kurac-sistemo furoris tra la tuta lando. En 1976 en Ĉinio 90 procentoj de la agrikulturaj produktaj brigadoj praktikis kooperan kurac-sistemon.

De 1983, kiam Ĉinio ekpraktik-

is laŭkontraktan respondecan sistemon de produktado en la kamparo, la strukturo de la kolektiva ekonomio ŝanĝiĝis kaj la koopera kurac-sistemo portempe ne adaptiĝis al tiu nova ŝanĝiĝo de la produktaj rilatoj kaj malprosperis. En 1985 la vilaĝoj, kiuj daŭre praktikis tian kurac-sistemon, konsistigis nur 5 procentojn de la vilaĝoj de la tuta lando kaj en 1989 4.8 procentojn. La kialoj kuŝas en tio, ke unue, multaj homoj opiniis, ke la koopera kurac-sistemo estas kaŭzita de la kultura revolucio en 1966-1976, ĝi peze ŝarĝis la kamparanojn finance kaj, ke la koopera kurac-sistemo ne plu necesas post la efektiviĝo de la laŭkontraktasistemo de produktado. Due, oni malstreĉis la administradon, precipe la kolektado de la fonduso kaj ĝia uzado ne alkonformigis sin al la ŝanĝiĝo de la ekonomia strukturo, kaj rezulte ĝi farigis peza ŝarĝo de la kolektiva ekonomio.

Tamen iuj lokoj daŭre praktikis la kooperan kurac-sistemon. Ekz., en Ŝanhajo, el ĝiaj 2 990 antaŭurbaj vilaĝoj 95 procentoj persistis en la sistemo, kaj en Taicang-gubernio, Jiangsu-provinco, ĉiuj vilaĝoj daŭrigis la praktikadon. Ili ĉiuj faris iagradan reformadon al la originala kurac-sistemo por adapti ĝin al la ŝanĝiĝo de la ekonomia situacio. Zhaoyuan-gubernio de Shandong-provinco faris reformojn en kvin flankoj: Antaŭe la kooperan kurac-sistemon prizorgis sole administracio, sed nun tion faras la administracio kaj kolektivo kune. Nun la sistemo ampleksas kuracadon, sanprotektadon kaj konvaleskadon sed antaŭe sole kuracadon. Antaŭe la kapitalon amasigis sole kolektivo, sed nun tion



Diagnozo al malgranda paciento

faras la urbetoj, vilaĝoj kaj kamparanoj. La reformoj vigligis la kooperan kurac-sistemon. En 1990 97 procentoj de la tieaj loĝantoj ĝuis la kooperan kuracadon.

EKEFIKIS ASEKURO PRI SANO

En 1987 la gubernioj Meishan kaj Jianyang de Sichuan-provinco kaj Jinshan kaj Songjiang de Ŝanhajo prove ekpraktikis asekuron pri sano. La higienaj departementoj de tiuj gubernioj kune kun la lokaj asekuraj kompanioj per asekura meĥanismo iagrade malhelpis la malriĉigon de kamparanoj pro malsano. Sed pro diversaj kaŭzoj la metodo kun iuj mankoj estas malfacile perfektigebla. Tiel aperis kuraca asekuro starigita de medicinaj departementoj per fonduskolektado.

Simple dirite, la metodo estas kolekti monsumojn de kolektivo (distrikto aŭ vilaĝo) kaj individuaj kamparanoj, kaj fari fonduson de kuraca asekuro kaj funkciigi asekuran meĥanisman por racie difini kompensan proporcion, altigi la kontraŭdangeron povon de la kamparanoj kaj eviti la malriĉigon de malsano.

La vilaĝo Laozhai de Yicheng-gubernio, Shanxi-provinco, havas 250 familiojn kun 1 050 loĝantoj. La jara pokapa meznombra enspezo estis 475 juanoj. Surbaze de tiu cirkonstanco la vilaĝo decidis ĉiujare preni 2 000 juanojn el sia akumulo, 200 juanojn de la vilaĝaj entreprenoj kaj 2 000 juanojn de la vilaĝanoj kiel fonduson de la kuraca asekuro. La pacientoj ĝuas 20 procentojn da rabato en la ambulatoria servo, 30 procentojn da rabato kuracate en hospitalo. Se oni suferas de serioza malsano, ili ĝuas pli grandan rabaton. Tiel multe altigis la kontraŭdangera povo de la kamparanoj. En la pasinteco ĉiujare bankrotis kelkaj familioj pro malsano, sed dank' al praktikado de la kuraca asekuro neniam okazis la simila afero.

Nun en Nanhui de Ŝanhajo, Siping kaj Bao'an de Guangdong, Huarong de Hunan, Xinjian de Jiangxi tiu asekura sistemo pri sano estas praktikata kaj jam ricevis bonan efikon.

ATENTINDA KOOPERA KURACA ASEKURO

La kooperaca kurac-sistemo kaj la asekuro pri sano similas unu al la

alia, sed ne egalas. La kooperaca kuraca asekuro povas esti rigardata kiel kuniĝo de ili ambaŭ, t.e. surbaze de la kooperaca kurac-sistemo oni praktikas certajn principojn kaj sciencan administradon de asekura servo, tenante la avantaĝojn de kooperaca kurac-sistemo kaj forigante ĝiajn mankojn, tiel ke la teorio pri asekura servo kaj praktiko de kooperaca kurac-sistemo kompakte unuiĝas kaj pli bone konformas al la reala stato de la ĉina kamparo.

Tingxin-distrikto de Jinshangubernio de Ŝanhajo praktikas la kooperan kuracan asekuron laŭ jena maniero: la distrikto fondis administrantaron de kooperaca asekuro pri sano konsistantan el plurflankaj reprezentantoj, kiu respondecas pri antaŭkalkulo de asekura fonduso kaj kompensa proporcio kaj difino de elspezoj nekompensataj. Oficistoj de guberniaj medicina buroo, asekura kompanio kaj la distrikta registaro kune administras kaj kunarangas la laboron. La kamparanoj povas laŭvole asekurigi sian familion per pago de certaj monsumoj (La monsumo estas difinita de vilaĝo mem laŭ la financa stato.) La kamparanoj vizitas ambulatorion per legitimacio, konfirmita de la gubernia asekura kompanio. En 1987-1989 la distrikto kolektis la fonduson de 1 074 591 juanoj. Elspezinte kuracan (asekuran) kaj administran elspezojn, la distrikto nun havas 24 000 juanojn (inkl. de interezo de la fonduso). La enketo montras, ke 91.36% de la tieaj kamparanoj estas kontentaj pri la kooperaca kuraca asekuro. Sed tiu metodo estas praktikebla nur en kompare riĉaj regionoj de Ĉinio.

Pro la vasta teritorio, grandnombra loĝantaro, malekvilibro de la ekonomia disvolviĝo de diversaj lokoj kaj kompare granda diferenco de privataj enspezoj la praktikataj kurac-sistemoj estas malsamaj. Ili spertos longan praktikadon. Nun estas malfacile diri, kiu metodo estas pli bona kaj kiu malpli. ■

KONTRAŬ AKVA POLUCIO

de WANG GUILIN



Traktejo de malpura akvo apud loĝkvartalo en Ŝanhajo

AKVO estas tre grava por la homa vivo. Tamen pro la ĉiam pli serioziĝanta poluado per la malpura akvo ellasita de industria kaj agrikultura produktado kaj la ĉiutaga vivo, la uzebla akvo en la mondo fariĝis pli kaj pli malmulta. La akva polucio ne nur katenas la industrian kaj agrikulturan disvolvigon, sed ankaŭ minacas la homan vivon, tial malpliigi la akvan polucion fariĝis grava strategia problemo.

Laŭ la medicina vidpunkto por la homo akvo estas malpli grava nur ol aero. Akvo estas la plej granda inter la konsistigaj substancoj de la homa korpo. La poluita akvo povas kaŭzi ne nur malsanon, sed ankaŭ morton. Laŭ gazetaj informoj nun

oni jam konas pli ol 50 malsanojn kaŭzitajn de malpura akvo. Laŭ statistiko de la Monda Higiena Organizaĵo en la tuta mondo ĉ. 1.5 miliardoj da homoj ne havas puran sekuran akvon. Pro tio la 35-a Ĝenerala Asembleo de UN okazigita en 1980 decidis, ke 1981-1990 estu Dek Internaciaj Jaroj de Livero de Trinkebla Akvo kaj Higieno kun la celo "ĉiuj trinku sekuran, puran akvon". Havigi puran akvon al ĉiuj loĝantoj de la tero estas grava enhavo en la plano "En 2000 ĉiuj ĝuos elementan sanigan metodon" ellaborita de la Monda Higiena Organizaĵo.

La akva polucio jam kaŭzis seriozan ekonomian perdon. Ekz. la rivero Rimac, la akvoprovizanto al Limao, ĉefurbo de Peruo, estas poluita kaj sekve de

tio la elspezo por kemiaĵoj kaj desinfektaĵoj antipoluciaj leviĝis je 30%. En la suda Koreio pro la polucio de Han-rivero Seulo devas ĉerpi akvon el ĝia supra parto, pro tio la elspezo por akvo pliigis. La stato de Ŝanhajo estas simila kaj oni devas ĉerpi akvon el la supra parto de la rivero Huangpu je 40 km for de la urbo kaj por tio oni elspezis 300 milionojn da usonaj dolaroj.

Por eviti kaj malpliigi la akvan polucion oni devas bone trakti la akvan polucion. Malpuran akvon estigas ĉiujminute la industria kaj agrikultura produktado kaj la ĉiutaga vivo. Estas tre grave difini normojn de akva kvalito kaj ellaso de malpura akvo.

Antaŭ nelonge la Eŭropa Komunumo publikigis novan leĝon pri la normo de akvo uzata en la malsamaj kampoj, kio akcelas la disvolviĝon de la traktado de la malpura akvo. Dank' al difino de la normoj de la kvalitoj de la akvo dolĉa kaj trinkebla, la duagrada traktado de malpura akvo en urbo populariĝas kaj disvolviĝas. Nun sukcesis la esplorado pri denitrogeno kaj populariĝas la tekniko per aktiva karbo senigi organikajn restaĵojn, kia kloro metano. Krome rigore malpermesi ellason de eluzita akvo kun dangeŝaj substancoj multe utilas al limigo de la malpura industria akvo. La Eŭropa Komunumo faris rigoran difinon pri la akva kvalito mikrobiologia de la marbanejo kaj konkulbredejo. Pro tio oni devigite ellasas la malpuran akvon al la malproksima maro.

La higiena departemento de Kalifornio faris rigoran difinon pri la akva kvalito, por tiun garantii la hidroelektra departemento de Los-Anĝeleso investis 146 milionojn da usonaj dolaroj kaj fondis en 1978 akvan filtrejon, kiu ĉiutage filtras 2.27 milionojn da tunoj da akvo per ozonizado. Pro ozoniza desinfektaĵo oni multe malpliigis la haloformon (CHX3) en la akvo, ke la haloformo entenata en la akvo fariĝis ege malpli multa ol permesas la normo de la Kalifornia registaro (100 mikrogramoj en ĉiu litro).

En la lasta jarcento la akva polucio multe ĝenis Usonon. Por efike redukti polucion la registaro jam konsumis grandajn homfortojn kaj monsumojn. Antaŭ cent jaroj Masaŝuseco jam konis la grandan malutilon de la akva polucio al la homa sano. Por solvi la problemon pri la poluado de la akva fonto la higiena departemento de la Ŝtato fondis specialan laboratorion en Laurens en 1886. La laboratorio proponis, ke oni devas unue filtri la malpuran akvon antaŭ ol ellasi ĝin en riveron. En 1890-1891 tifo trafis multajn loĝantojn de Lowell kaj la malsano infektis ankaŭ aliajn lokojn de la malsupra baseno de la rivero Merrimack. Post la atentema esploro la laboratorio konstatis, ke tifo disvastiĝis al aliaj lokoj pere de Merrimack, kiu fluas tra la urbo. La higiena buroo de la Ŝtato postulis, ke ĉiuj loĝkvartaloj establu kolektan kaj traktan sistemon de la malpura akvo. Post tio en Masaŝuseco multe malpliigis la morbokvanto de tifo kaj aliaj digestaj malsanoj kaj

en la 30-aj jaroj de la nuna jarcento tiuj malsanoj fundamente malaperis.

En 1948 la Usona Parlamento aprobis la unuan ŝtatan leĝon pri la akva polucio. En 1953 kaj la sekvantaj 2 jaroj la parlamento faris aldonon al la leĝo. En 1956 la Usona Parlamento aprobis la unuan leĝon pri investo por regi la akvan polucion kaj en la sekvantaj 10 jaroj Usono investis sume 500 milionojn da usonaj dolaroj por redukti la akvan polucion. En 1972 la Usona Parlamento sankciis la normon de rego de la akva polucio, kiun oni praktikas eĉ hodiaŭ. Laŭ la normo Usono postulas, ke ĉiuj urboj kaj industriaj entreprenoj nepre devas havi permeson ellasi malpuran akvon en la naturan akvuĵon. Ĉiuj ĉi leĝoj kaj normoj estas utilaj por regi la akvan polucion.


Trakti malpuran akvon estas ŝlosilo por regi la akvan polucion. Ne trakti la malpuran akvon kaj toleri ellasi ĝin en la tersurfacan akvuĵon povas kaŭzi seriozan rezulton. Kiam poluaĵoj de la tersurfaco superas ian gradon, do estiĝas polucio. Kiam la polucio superas la kapablon de la media mempurigo, do estas detruita la akva medio, dank' al kiu la homoj vivas. Por ke la homoj povu daŭre vivi sane sur la tero, ni devas regi la akvan polucion. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	11.50	18.50	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	USD	7.80	12.50	17.50


Budhismaj seminarioj en Pekino


Teksto kaj fotoj de WU XINHUA



Leciono de kaligrafio


En la Supera Budhisma Seminario Tibetlingva de Ĉinio





Viva budho Quexi, fama budhisma majstro kaj konsilanto de Tar-templo, prelegas pri budhisma sutro.


Budhisma leciono



MULTAJ legantoj letere demandis nin pri studo kaj vivo de la bonzoj en budhismaj seminarioj. Por kontentigi ilin, antaŭ nelonge mi vizitis du superajn budhismajn seminariojn de Ĉinio — la Ĉina Budhisma Seminario kaj la Supera Budhisma Seminario Tibetlingva de Ĉinio.

La Ĉina Budhisma Seminario situas en la miljara Fayuan-templo de Pekino. Kvankam ĝi troviĝas en urba kvartalo, tamen la medio estas tre kvieta. Elektite kaj rekomendite de la temploj, la junuloj bonziĝintaj antaŭ pli ol 2 jaroj eniras en la seminarion post rigora ekzameno kaj tie lernas 4 jarojn. La seminario elbakis multajn talentulojn. Preskaŭ ĉiuj studentoj diplomitaj en la 50-aj jaroj laboras sur grava posteno de religiaj rondoj. El ĝiaj studentoj diplomitaj antaŭ kelke da jaroj, iu 26-jara nun funkcias kiel abato de granda fama templo kaj pluraj el ili daŭrigas sian studon en Sri-Lankao. Vicestro de la seminario, supera bonzo Chuanyin, diris al mi, ke la studentoj studas diligente. Ili komencas sidi en meditado jam antaŭ la tagiĝo. Fininte la tagan lernadon, ili devas fari ceremonion en la ĉefa halo, reciti sutrojn kaj legi librojn vespere. En la 4 jaroj ili devas benediktane lerni kursojn de budhismo, la ĉina lingvo, historio, filozofio, fremda lingvo kaj kaligrafio. Mi demandis iun studenton, ĉu li povas elteni la streĉan studadon. Kun rideto li respondis: “Vi karnuloj ja laboras por trapasi ekzamenon, sed ni monaĥoj devas asimili la budhismajn klasikaĵojn en nian animon. Bonaj poentoj pruvas fidelon al

Viva budho Nacang (maldekstre) okupita de fotado



budhismo kaj noblajn spiritojn.” En paŭzo inter lecionoj iuj studentoj promenante aŭskultas sonbendon kaj murmuris. Mi pensis, ke ili recitas sutrojn, sed demandinte, mi eksciis, ke ili lernas la anglan lingvon. Chuanyin diris: “La kutima lernado de la sutroj jam ne sufiĉas. Nun fremdaj lingvoj estas grava instrumento por la modernaj monaĥoj. Nia seminario donos lecionon de la tibeta lingvo, ĉar en la lokoj loĝataj de la hanoj multaj budhismaj klasikaĵoj perdiĝis pro militoj en la longa historio, tamen ili troveblas en la tibetlingvaj sutroj. La Ĉina Budhisma Seminario ja kulturas altnivelajn bonzojn, kiuj plenumos la taskon disvolvi la budhismajn aferojn.”

La Supera Budhisma Seminario Tibetlingva de Ĉinio fondita de majstro Banĉen Erdini troviĝas en Huangsi-templo, Pekino. Blanka budhisma pagodo impone staras en prospera pinaro en la korto ĉirkaŭita de ruĝaj muroj. Klasĉambro troviĝas en la grandioza klimatizita halo kun luksaj lustroj. En la seminario estas aŭdovida klasĉambro kaj biblioteko kun abundaj libroj. Tie la dormoĉambroj estas helaj kaj vastaj. En ĉiu dormoĉambro estas du litoj, sofo, tapiŝo kaj vestoŝranko. La seminario senpage donas al la studentoj manĝon, lernolibrojn kaj litaĵojn. Ĝi estas la plej supera lernejo por progresigi vivajn budhojn kaj geŝjiojn (altranga bonzo). El la nunaj 51 studentoj 17 estas vivaj budhoj. Ili studas 2 jarojn budhismon, kalendaron kaj han-nacian lingvon. En la instruado la seminario observas la rigoran stilon de la tibeta budhismo. Oni ne nur registras la poentojn de ĉiu lernanto sed ankaŭ publikigas ilin, ne konsiderante ĉu la ekzamenito estas viva budho aŭ ordinara bonzo. La seminariestro, viva budho Nacang, ofte okazigas kunvenon por interkonsiligi pri instruado. Li vizitis multajn lokojn por peti eruditajn bonzojn instrui en la seminario. Pro tio la geŝjioj kaj lamaoj en Tibeto tre deziras lerni tie. La vivaj budhoj studentaj en la seminario, neniom malstreĉas sian studon. Ili lernas diligente kaj progresas senĉese. Iun dimanĉon mi hazarde renkontis en la Pekina Planetario kelkajn vivajn budhojn de la seminario. Ili venis por ripeti kalendaron. En nia kontakto mi rimarkis, ke ili estas saĝaj kaj viglaj eĉ pli ol ordinaraĵ lamaoj. Ili havas ĉiu sian apartan hobion. La estro de la seminario Nacang amas fotadon. Oficvojaĝante aliloken, li ĉiam kunportas kun si fotilon kaj plurajn lensojn. Li estas membro de la Fotista Asocio de Sichuan-provinco. Mi estis ĝoja, ke mi vidis fotojn faritajn de li. Lia pejzaĝaj fotoj impresas impone. Huangsi-templo en liaj fotoj estas aparte kvieta kaj majesta. Mi pensas, ke eble tion decidis la vidpunkto de religiulo. ■

LOĜDOMOJ KAJ MOROJ

Domoj de Dingcun — “palaco” de nordaj kamparanoj

Teksto de DA WEI

Fotoj de YAN JIN

EN Xiangfen-gubernio en suda Shanxi-provinco, oriente de Fenhe-rivero, estas Dingcun-vilaĝo. Kvankam malgranda, ĝi altiras la atenton de la publiko. En la 50-aj jaroj oni trovis sub ĝia tero postsignon de homa aktivado antaŭ 100 000-300 000 jaroj, tial la vilaĝo estis difinita kiel grava ĉina kultura ruino de la meza periodo de paleolitiko. Kaj sur la tero konserviĝas loĝdomoj de Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911).

Laŭdire, Dingcun-vilaĝo estis loĝloko de Ding-familio. Poste ili transiris de terkulturo al komerco, kaj ilia komerco pli kaj pli prosperiĝis kaj iliaj loĝdomoj pli kaj pli multiĝis. Hodiaŭ en la vilaĝo estas pli ol 260 familioj kun 1 000 homoj, kies plejparto estas posteuloj de Ding-familio. Ili okupiĝas ĉefe pri terkulturo kaj malmulte pri komerco.

La domoj de Dingcun-vilaĝo estas en stilo de kvadrata korto ĉirkaŭita de ĉambroj. La arkitekturo estas ŝatata de nordaj hanoj. La vilaĝo havas 40 domojn kun 600 ĉambroj. La plej malnovaj domoj estis konstruitaj en 1593.


Por konservi kaj pristudi la loĝdomojn, morojn kaj kulturon de Dingcun-vilaĝo, oni malfermis parton de la domoj kiel muzeon. Antaŭ nelonge mi venis tien por intervjuo. S-ro Li Zhaoxiang, direktoro de la muzeo kaj fakulo pri loĝdomoj, akompanis min en la vizito kaj konigis al mi la karakterizaĵojn kaj stilon de loĝdomoj de Dingcun.



Tiu kaj alia kortoj estas interligitaj per flanka pordo, koridoro aŭ korteto. Mi iris kvazaŭ en labirinto kaj ne povis juĝi, en kiu direkto mi troviĝas. S-ro Li diris al mi, ke la loĝdomoj el tri grupoj etendiĝas de nordoriento al sudokcidento. Ili konstruiĝis en Ming- kaj Qing-dinastioj kaj estas iom diferencaj en stilo. Ĝenerale, la domoj de Qing-dinastio estas pli grandaj kaj pli altaj kaj kortoj pli profundaj; la domoj de Ming-dinastio ĉirkaŭas nur unu korton, dum tiuj de Qing-dinastio antaŭan kaj malantaŭan kortojn. Sed la domoj de Dingcun havas

komunecon en strukturo: oni starigis unue lignajn fostojn kaj poste brikajn murojn, kovris per duklina tegmento kaj faris subtegmenton por konservi grenon kaj diversajn objektojn. La orienta kaj okcidenta ĉambroj estas destinitaj por loĝado, dum la suda kaj norda por kulto kaj aliaj aktivadoj, aŭ por teni objektojn.

La 88-jara Chai Yingzi estas la mastrino de domo

Bilardo






Brikaj ornamoj sur firstoj




Domoj de Dingcun-vilaĝo




Alero

Bela farunaĵo



Preparado de belaj farunaĵoj por tradicia festo





Reliefoj ĉe alero

en la sudo de la vilaĝo. Kiam ni vizitis ŝian hejmon, ŝiaj familianoj estis manĝantaj sidante ĉirkaŭ malgranda tablo en la korto. La surda avino parolis laŭte, timante ke oni ne bone aŭdos. Ŝi senĉese kriis kontraŭ ni. Mi ne komprenis, kion ŝi diris. Ŝajne ŝi pensis, ke ni venis aĉeti ŝian domon. Ŝi klopodis por komprenigi, ke ŝi ne volas transloĝiĝi.

Kune kun la avino vivas la tri-membra familio de ŝia pli-ol-40-jara nepo Ding Qifeng, honesta kamparano. Li diris al mi, ke en la lastaj jaroj de Qing-dinastio lia praavo konstruis tiun domon kun naŭ ĉambroj, ke la domo estas bone konservata.

Mi vidis nemalmultajn gravuritajn desegnojn simplajn kaj antikvecajn sur la pordoj, fenestroj kaj septoj de la tri nordaj ĉambroj. S-ro Li konigis, ke la loĝantoj de Dingcun-vilaĝo donis grandan atenton al pentrado kaj gravurado, kaj oni emfazis pentradon en Ming-dinastio kaj gravuradon en Qing-dinastio. La domoj konstruitaj en la komenca periodo de Qing-dinastio havas altan verandon. Ĉe la aleroj kaj konzoloj vidiĝas elstaraj verkoj de gravuristoj. Ili uzis superan poplon kiel materialon kaj faris diversajn reliefojn kaj bareliefojn, kiuj temas pri fabloj, teatraj roloj, vivkutimoj, animaloj kaj vegetaloj.

En la posta periodo de Qing-dinastio oni konstruis domojn sen verando kaj faris simplajn gravuraĵojn sur pordoj, fenestroj kaj septoj. Tia estas la domo de Chai Yingzi.

Evidente ŝiaj tri nordaj ĉambroj estas la ĉefaj. La meza ĉambro kun pordo estas salono kaj ambaŭflanke estas po dormoĉambro. En la salono estas kvadrata tablo, longa kulta tablo de malnova tipo, sofoj kaj televidilo. Tie la familio prenas manĝon kaj

akceptas gastojn. Sur la funda muro estas malgranda niĉo kun 6 pordoj gravuritaj. Oni tenas tie memortabletojn kun la nomoj de la prapatroj kaj antaŭuloj. En la Printempa Festo la tuta familio kultas tie siajn prapatrojn kaj antaŭulojn.

En la dormoĉambro de la avino estas granda terlito, ĉe kies ekstremo estas forno. Sub la plafono pendas ligna ŝtupareto. Oni povas malpendigi ĝin kaj supreniri laŭ ĝi en la subtegmenton. Ambaŭflanke de la terlito estas murŝrankoj. La granda servas por teni litkovrilojn kaj la malgranda kun latuna seruro, videble, por teni valoraĵojn. La lakita vestoŝranko, la subportilo de latuna pelvo, la tablo, la seĝoj, la benkoj, la surlita trink-tableto kaj la trinkilaro, ĉiuj estis faritaj en Qing-dinastio, eĉ la rondaj silkaj ventumiloj estas de tiu dinastio. El tio oni vidas, ke la vilaĝanoj tre domaĝas la tradician kutimon de siaj prapatroj. La vilaĝanoj atentis ne nur la aspekton de la domo, sed ankaŭ la dekoracion de la ĉambroj kaj utiligon de la spaco. S-ro Li diris, ke Ding-familio ellaboris interesan planon por domoj kaj stratoj. Ili konstruis domojn en T-formo kaj templon ĉe ĉiu vojkruciĝo. Ili tion faris por beni la familion je prosperiĝo.

En la vilaĝo mi vidis ankaŭ novajn loĝdomojn ĉirkaŭ la malnovaj. La novaj domoj portas ĝenerale la tradician stilon, ekz. kun duklina tegmento kaj subtegmenta etaĝo, sed sen gravuraĵo. Oni plibonigis ĝiajn pordojn kaj fenestrojn, ke ili povu enlasi pli da lumo kaj havu pli bonan hermetikecon. Oni ne plu konstruas loĝdomojn kun korto en la mezo. Ĉiu familio nun loĝas en aparta kortetohava domo. Nun la vilaĝanoj ŝajne donis pli grandan atenton al la utileco de domo. ■



En la dormitorio de Chai Yingzi

En korto




Koloraj skulptaĵoj en antikva templo

Militisto



Shuanglin-templo de Shanxi-provinco estis konstruita antaŭ 1 500 jaroj. La elegantaj koloraj skulptaĵoj en la templo ĝuas famon en la ĉina skulptura historio. Ili estas laŭdataj kiel trezoro de la koloraj skulptaĵoj de la Oriento. En la 10 haloj de la templo konserviĝas 2 052 koloraj skulptaĵoj, kiel budhostatuo kaj statuoj de bodisatvoj, arhatoj, militistoj kaj servistoj. La plej granda el ili altas pli ol 3 metrojn kaj la plej malgranda — 30 centimetrojn. La diversmienaj figuroj aspektas majeste kaj versimile. Plejparto de ili estis kreita de popularaj artistoj de Ĉinio en la jaroj 960-1644.

Budhostatuo



Fotoj de YAN JIN




Bodisatvo



Avalokitesvaro

Pendantaj skulptaĵoj



Tibeto

Memore al la subskribo de la interkonsento farita inter la Centra Popola Registaro kaj la Tibeta Registaro en la 23-a de majo 1951 pri la paca-liberiĝo de Tibeto, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis en la 15-a de marto 1952 poŝtmarko-serion pri la paca liberiĝo de Tibeto, kun bildoj de Potala-palaco kaj plugado per poefago (supre). Okaze de la inaŭguro de la Xikang-Tibeta kaj Qinghai-Tibeta Ŝoseoj sur la Tibeta Altebenaĵo, ĝi emisiis en la 30-a de marto 1956 tri specialajn poŝtmarkojn (meze). La 1-an de septembro 1965 fondiĝis la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Memore al ĝia 20-a datreveno oni emisiis en la 1-a de septembro 1985 poŝtmarko-serion (malsupre), kiu prezentas per tipa tibet-nacia arto la bildojn "Prospero", "Riĉa Rikolto" kaj "Gaja Celebrado" por speguli la novan vivon de tibetanoj.

